

Esperanto
V-4252/82 (1989)
1989 majo
82-a jaro
n-ro 1001 (5)
(aperas monate escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun un kaj unesko)
sidejo: nieuwe binnenweg 176 • 3015 bj rotterdam • nederlando



Esperanto kaj rokenrolo
furore kombiniĝas en Slovakio!

Vi trovos,

ke ne nur la rokenrola mondo malkovris Esperanton. Ĉi tiu numero rigardas en la komputilejon, la universitaton, la fabrikon, kaj trovas ĉie la komencan flagron de faro-fajro. Post cent jaroj la ligno pretas. Kaj ĉirkaŭ ĝi ekblovas oportuna vento, ĝusta por kapti la unuajn fajrerojn kaj disporti la bruladon. Sovetunio kaj Ĉinio malfermas sin al la mondo – kaj dum la tajpado de ĉi tiuj linioj, ankaŭ unu al la alia. Oni atendu sismajn evoluojn pro tio en la azia movado. Rande de Pacifiko kaj en Orienta Eŭropo okazas politikaj kaj ekonomiaj reformoj – kaj Esperanto ligas koreojn kaj hungarojn, donante ekzemplon por centoj kaj miloj da similaj kontaktoj. La voĉoj de neeŭropanoj laŭtiĝas en la mondo; samtempe iliaj lingvoj ĉesas interesi nur la eŭropajn poliglotojn, fariĝante komerc-komunikiloj kaj kulturaj periloj. Kreskas, do, la bezono de praktika kaj neŭtrala interlingvo – kaj pretiĝis la instrumento, kiun DLT trovis ĉemane por tuja uzo. Jes ja, la fajro ekbrulas. Niaj paĝoj varmigu ankaŭ vin!

Enhavo

- 81 Printempaj notoj el Moskvo (Simo Milojević)
- 82 "Neniam mi vidis tiom da nacioj en unu loko!" (Curt Ford)
- 83 Faka agado: Ĝemeliĝis per Esperanto korea kaj hungara universitatoj
- 84 Esplorvojaĝo tra Azio: Fekunda tero en la Indus-valo; Multlingveco ne estas baro en Bharato (Joachim Werdin)
Kulturo: TEAM' reklamas ne nur silenton!
- 86 Distribuita Lingvo-Tradukado: DLT survojas al industriskala produktado (Klaus Schubert)
- 88 Aplikado: Komerca entrepreno – kaj aŭdaca eksperimento
Terminologia Esperanto-Centro: Defiaj perspektivoj
- 89 Sciendaĵoj por lingvokonsciuloj (Detlev Blanke)
- 90 Informado: Miksitaj sintenoj ĉe la lingvistoj (Maire Mullarney)
Seminarioj: Kien celu la eŭropa junularo? (Alessandro Amerio)
- 91 Komisiitoj: Kial necesas Komisiito por Handikapitoj? (R. Kent Jones);
KSM demandas: Kie la okcidentanoj? (R. Llorens)
- 92 Mil kaj unu numeroj de la revuo *Esperanto*: Akuŝanto de la nova epoko (Reto Rossetti); Sufiĉe abunde da literaturo (William Auld);
Premsonĝoj pri pezaj jaroj (Victor Sadler); Ĉiam strebe al tutmondeco (Nagata Akiko); Ĝi estis mi, mi estis ĝi (Simo Milojević)
- 95 Recenzoj: *Sanga nupto* kaj *La domo de Bernarda Alba* de Federico García Lorca (Amador Díaz); *Aŭstralia antologio*, red. Alan Towsey (Jozefo Major); *Laŭdo de l' Stulteco* de Erasmo de Roterdamo (Osmo Buller)
- 97 Laste aperis . . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto)
Foliume (pripresaĵaj raportetoj)
- 98 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 100 Nekrologoj; Oficiala informilo

La kovrilo

En la nuna hasta mondo, unikaĵo ne longe restas unikaĵo. Antaŭ kelkaj monatoj, nederlanda kantstelulo Rob de Nijs surprizis sian hejmlandan merkaton per la dulingva disketo *Unu voĉ' tutmonde*: unuafoja publika prezento de Esperanto kiel rokenrola lingvo. Sed jam superis lin la furora slovaka grupo TEAM': ilia plengranda disko *Reklamo al silento* baldaŭ trafos en la vendejojn (vd. p. 84). Ni streĉe atendas: ĉu la usona kantisto Princo baldaŭ proponos kant-vidbendon en la internacia lingvo?

esperanto

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910); establita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). Legata en 105 landoj. Voĉlegata por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 44,50; US\$ 21; GM 39; enoj 3600; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Movada rabato 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de la CO de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: + 31 10 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telefakso: + 31 10 436 1751.

Telekso: 23721 uca nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: Neil Salvesen.

Estraro de UEA

Prezidanto (planado, esploro kaj dokumentado): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, University of Hartford, West Hartford, CT 06117-0395; tel. (203) 243-4417; telefakso: (203) 243-4070; telekso 9102505313.

Vicprezidanto (financa evoluigo): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35.

Vicprezidanto (kulturo): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tōkyō, 153, Japanio; tel. (3) 770 64 86; telefakso + 81 3 461 7807; telekso J29400 tokinbth.

Ĝenerala Sekretario (kunordigo de la funkciado de la asociaj organoj): d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.

Estrarano (landa, regiona, kaj faka agado): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.

Estrarano (scienca kaj teknika aplikado de Esperanto): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg hp. 5, H-1054 Budapest, Hungario; tel. (36/1) 317 243; telefakso (36/1) 666 808; telekso 225931 muegy h.

Estrarano (eksteraj rilatoj): d-rino Barbara Despiney, 21 rue des Cuverons, F-92220 Bagneux, Francio; tel. (1) 46 65 22 16.

Estrarano (kongresoj): s-ro Diccon Masterman, "Quasi in Cima", Via di Cecina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio; tel. (583) 570 66.

Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ro Edward Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (03) 666 62 66.

Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ro Jan Koszmaluk, 8 Villa Stendhal, F-75020 Paris, Francio; tel. (1) 43 66 63 47.



*La partoprenantoj de la Konsultiĝo
dum ekskurso al la Monaĥejo Zagorsk.*

Printempaj notoj el Moskvo

Ekzistas esperantistoj, kiuj revas pri partopreno en Universala Kongreso. Mi, post 20-jara deviga kongresado, apartenas al la mala grupo. Ne mankas tamen movadaj revoj al mi. Unu el ili ĵus realiĝis: mi partoprenis la "faman", la sekretan, la nealireblan Konsultiĝon de la Esperanto-asocioj el la socialismaj landoj.

Siatempe, kiam mi estis redaktoro de ĉi tiu revuo, la fermitaj Konsultiĝoj eĥis ĉe mi tute detruie. Ili estis pruvo, ke la bloka politika dividiĝo spegulas sin ankaŭ en nia movado, kreita por kunlabori, ignori diferencojn, transponti dividiĝojn. Tamen, mia ĵusa partopreno ne estis rezulto de miaj multnombraj flustroj, sugestoj kaj petoj tra la pasintaj du jardekoj.

La 25-an de januaro ĉi-jare, plimulto de la reprezentantoj de pli ol 200 Esperanto-klubo en Soveta Unio decidis forlasi la sterilan burokratan egidon de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE) kaj revivigi la iaman Sovetrespublikaran Esperantistan Union (SEU), kiun Stalin sufokis en 1937 (vd. nian n-ron de februaro, p. 22). La 31-an de januaro, tiu ne plu ekzistanta ASE leteris al UEA inviton ĉeesti la Konsultiĝon! Simila invito venis ankaŭ al TEJO. Nur kiam mi telefonis al Moskvo kaj certiĝis ke SEU estos en la Konsultiĝo, montriĝis inde akcepti la inviton. La marta kunsido de la Estraro decidis, ke mi reprezentu UEA tie. Evidentiĝis, ke ankaŭ nia vicprezidanto Umeda havas privatan inviton ĉeesti.

La 22-a Konsultiĝo okazis en Moskvo de la 18-a ĝis la 22-a de aprilo. Ĝin partoprenis trideko da delegitoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Germana DR, Hungario, Kubo, Pollando, Vjetnamio. Estis tie delegito de la refondita Litova Esperanto-Asocio kaj deko da reprezentantoj de SEU kaj aliaj sovetiaj Esperanto-instancoj. Unuafoje sidis tie ankaŭ ni, reprezentantoj de UEA kaj TEJO (kies prezidanto Jan Koszmaluk ĉeestis).

Se la Konsultiĝo estus evoluinta laŭ la scenaro de la organizinto ASE kaj ties tegmenta instanco Asocio de Sovetiaj Societoj por Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksterlando (SSOD), ĝi ne meritus nian atenton. Feliĉe, jam en la unua sesio la partoprenantoj decidis malakcepti la proponitan tagordon kaj la truditan konsiston de la sovetia delegacio. Tiel el la originaj

ideoj de SSOD restis nur la pompa kunsido en ĝia palaco ĉe la Avenuo de Kalinin n-ro 14, manĝoj en la restoracio "Ivuška", kaj loĝado en la labirintoj de la Hotelo "Rusio".

Kvankam en la tagordo troviĝis ĉio de lingvistiko, kotizoj, kongresoj kaj transpagaj problemoj ĝis paco kaj ekologio, la Konsultiĝon markis funda priekzameno de la problemoj, kiujn spertas la Esperanto-movado en Soveta Unio. Kaj tiuj problemoj ŝajnas esti la samaj kiujn hodiaŭ spertas la sovetia socio: skleroziĝinta burokrata aparato malfacile cedas sian lokon eĉ kiam tion postulas neniu malpli ol la popolo mem.

En ĉi tiu konkreta kazo, dekoj da miloj da sovetiaj esperantistoj volas mem gvidi la evoluon de Esperanto en sia vasta lando. Ili ne plu akceptas, ke oni trudu al ili "gvidantojn", kiuj komprenante nenion de aŭ pri Esperanto povas nur efike bremsi la laboron. Pruvo pri tio estas la trista 10-jara historio de ASE. Ne estis por mi malfacile ripeti en Moskvo tiun severan verdikton de UEA el februaro, sed estis nova kaj grandioza sperto konstati, ke oni en Moskvo pretas aŭdi tion sen komento.

Cetere, tiu kondamno de ASE kaj la esperoj, kiujn ni ligas al la restarigita SEU, estas nenio alia ol ribelo kontraŭ burokratismo kaj rutino, apogo al *glasnost* (malfermiteco) ankaŭ en la laboro de la sovetiaj esperantistoj. Ĉar, se la kampojn primastru la kamparanoj, se la fabrikoj apartenu al la laboristoj, tiam la arton prizorgu la artistoj kaj Esperanton la esperantistoj.

Tio eblas. Tio devas eble. La tradicio de Esperanto sur la teritorio de la hodiaŭa Soveta Unio estas tutan jarcenton longa, jam de Leo Tolstoj, de Zamenhof mem. Jes estis interrompoj, longaj kaj tragikaj, kiel tiuj kaŭzitaj de la stalinisma pogromo en la 30-aj jaroj kaj burokrata sterileco en la 70-aj kaj 80-aj. Sed kiel kutime okazas, premoj naskas ribelojn, provo de elimino kaŭzas disfloron. La movado por Esperanto floras nun en Soveta Unio. Centoj da kluboj, miloj da kompetentaj uzantoj de la lingvo, dekmiloj da lernantoj kaj apogantoj.

Jam delonge oni atendas la aliĝon de la sovetiaj esperantistoj al UEA kaj al tiu ĉi unika internacia komunumo. Tio baldaŭ okazos. Mi kunportis el Moskvo la aliĝpeton de SEU.

La Komitato de UEA traktos tion dum la Kongreso en Brajtono. SEU ankoraŭ ne estas leĝe registrita, kaj tio povus daŭri monatojn, jarojn eble. La Komitato sendube havos ĝustan respondon al la demando, ĉu necesas pacience kliniĝi antaŭ la burokrataj postuloj. SEU kuraĝas spiti al ili. Necesas subteni tiun kuraĝon.

El Moskvo mi kunportis alian novaĵon, apenaŭ kredeblan: interkonsenton pri baldaŭa represo de *La danĝera lingvo* de Ulrich Lins tie en Moskvo, ĉe la plej granda sovetia eldonejo "Progreso". Antaŭ kelkaj jaroj tio estis simple ne imagebla. Tial UEA siatempe kaŝis sian rolon en la eldono de tiu historio de la persekutoj kontraŭ Esperanto, por ŝpari malagrablecojn i.a. al siaj sovetiaj membroj. "Progreso" surprizos vin ĉi-jare ankaŭ per aliaj libroj en la internacia lingvo.

Sed la Konsultiĝo, kio pri ĝi? Aĥ, ĝi estis interesa kaj utila. Se ĝi iam diskutis "sekretojn", ili nun malaperis. La temoj traktitaj tie similis al la kutima movada tagordo. Oni unuflanke aprezis la rolon, kiun por tiuj landoj antaŭe ludis la Mondpaca Esperantista Movado (MEM), sed oni kritikis ĝian nunan agadstilon kaj postulis modernigon (kaj tutmondigon) de ĝiaj porpacaj streboj. La Komunista Esperantista Kolektivo (KEK) ricevis tie tutan vangofrapon en formo de konstato, ke ĝi laŭ sia nuna agadstilo estas nenecesa kaj absurda.

Montriĝis tie en Moskvo, ke la Esperanto-asocioj el tiuj landoj efektive havas pri kio konsultiĝi: ili agas en similaj sociaj cirkonstancoj, ili ofte spertas samajn problemojn. Similaj konsultiĝoj estus bonvenaj ankaŭ en aliaj mondopartoj, kvan-

kam ne nepre surbaze de la malnoviĝintaj receptoj pri la divido de la mondo.

Mi estis en Moskvo antaŭ dek jaroj kaj ne multe sopiris reveni. Io premis min tiam tie. Miaj amikoj ne rajtis viziti mian hotelon kaj ne kuraĝis inviti min hejmen. Ni sukcesis elbatali tablon en la kafejo "Artičeskoje". Mi pensis pri tiu bela vespero multfoje en la pasinta jardeko. Mi revis pri "Artičeskoje" en Rio kaj en Parizo, en Tokio kaj en mia propra Beogrado. Por eĉ ne paroli pri Roterdamo.

Nun denove en Moskvo, mi konstatas ke ĝi refariĝas tiu urbo, kiun mi konas el romanoj kaj poemoj, el muziko, el teatro. Oni spiras pli facile. Oni diskutas, babilas, amikiĝas. Mi ĝojis vidi, ke ekspozicio de Kandinskij vizitis Moskvon dum mia restado tie. Mi ĝuis promeni tra la restaŭrita malnova strato Arbat, estis en kelkaj hejmoj, akiris multajn amikojn. Ne gravis por mi, ke la maĉgumo estis aĉetebla nur kontraŭ dolaroj. Estis tamen triste konstati, ke tuta vendejo plenplenas je unumarka dento-pasto. Malmultaj aĉetas, ĉar ĝi kostas tutan rublon, kio estas preskaŭ trioblo de la prezo pagata ĉi tie en Roterdamo. Sed, en alia vendejo, por granda mondatlaso necesis dekono de la prezo pagenda en Nederlando.

Svarmas ŝanĝoj en Moskvo. Bonaj ŝanĝoj, subtenindaj. Mi nun sopiras reiri tien. Mi ne eltenos longe foresti. Kaj, mi ne plu revas ĉeesti la Konsultiĝon. Ĉu UEA estonte aŭtomate ricevos la inviton? Restas tamen mia revo foje malĉeesti Universalan Kongreson.

Simo Milojević

"Neniam mi vidis tiom da nacioj en unu loko!"

En mallumo de frumateni, la 29-an de marto, kelkdeko da diverslandaj esperantistoj elbusiĝis antaŭ la junulara hotelo "Junostj" apud Minsk, Sovetunio. Ankoraŭ duondormantaj post tutnokta trajnvojaĝo, ili trapaŝis la enirejon – kaj tuj okulfrotis kun miro. Antaŭ ili staris belorusa koruso, fortvoĉa kaj bunte vestita, kiu akompane de popolkantoj nacilingvaj kaj Esperantaj transdonis la tradician salutsimbolon de pano kaj salo.

Tiel komenciĝis la 2-a Internacia Junulara Renkontiĝo en Sovetunio, kiu fakte estis la unua sovetia renkontiĝo malferma por esperantistoj el ĉiuj landoj. Malgraŭ la malsomera sezono, ĝi allogis ĉirkaŭ 200 partoprenantojn (inter ili 60 nesovetianojn el 12 landoj) por ĉeesti ĉi tiun gravan paŝon en la longe atendita malfermiĝo internacien de la sovetia Esperanto-movado. Fakte, la aranĝo estis internacia en pli ol unu senco: frapan impreson donis la ĉeesto de ne nur rusoj, sed de litovoj, latvoj, armenoj, ukrainoj, uzbekoj, kazakoj kaj aliaj. Kiel komentis miranta eksterlandano: "Neniam mi vidis tiom da nacioj en unu loko!"

Nesurprize, eble, ĉe unuafoja tute internacia renkontiĝo, ne mankis fojaj malglataĵoj. Afiŝo nebule anoncis, ke iu diskutrondo "probable ne okazos"; programeroj ofte malfruis, aŭ anonciĝis tuj antaŭ komenciĝo. Tamen, post la unuaj du aŭ tri tagoj, la aranĝo trovis sian ritmon – funkciantaj tag-afiŝoj pli fidine klarigis pri kio kaj kiam, kaj la ĉeestantoj kutimiĝis al agrable loza programo kiu lasis sufiĉan tempon por neformala interkonatiĝo. Por multaj la plej memorindaj momentoj venis ĝuste en tia neorganizita kuna tempo; la babilado kaj kantado en la ĉambroj daŭris preskaŭ ĉiunokte ĝis sunleviĝo.

Aparte grandan lokon okupis muziko plej diversspeca. Dum la interkona vespero la partoprenantoj ja konatiĝis iom unu kun la aliaj, sed ĉefe kun la belorusa oper-kantado. La grupo el Kievo montris siajn lertojn pri stiloj ekde la ukraina popola ĝis

Foto: Ulrich Matthias



La nokta muzikado estis unu el la plej memorindaj programeroj el Minsk: supre, la ŝatataj kantistoj Nataŝa kaj Ĵamart.

moderna dancmuziko. La intime pensigaj kantoj de juna kazakia kantisto, Ĵamart Amzejev, ravis ne nur desceneje sed ankaŭ dum ĝismatenaj kunestoj. Sendube atendas la internacian movadon pliaj surprizaj kaj atentindaj malkovroj pro multiĝantaj kontaktoj kun la sovetia movado.

Kiel en aliaj landoj, ankaŭ la minska aranĝo funkciis kiel eta spegulo de la socio ĝenerale. Inter la plej interesaj programeroj – kaj por sovetianoj, kaj por alilandanoj – estis diskutgrupoj pri la historio de la sovetia Esperanto-movado, kaj pri perestrojko kaj Sovetunio. La temoj kuris de specifaj demandoj – kiel taksi la rolon de Stalin? – al plej bazaj temoj – kio fakte estas, kaj

Gemeliĝis per Esperanto korea kaj hungara universitatoj

En la fino de la jaro 1986 establiĝis Esperanto-Instituto en Dankook Universitato en Koreio. Tio eblis dank' al la fakto, ke d-ro Chang Choong-sik, prezidanto de la universitato, estas la prezidanto de Korea Esperanto-Asocio kaj ankaŭ membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. Li multon faris, faras kaj faros por la Esperanto-movado en Koreio, kaj de nun ankaŭ por la internacia Esperanto-movado.

En la 24-a de februaro 1989 okazis tre grava kaj valora evento rilata al Esperanto. En Budapeŝta Teknika Universitato en Hungario la du prezidantoj de Dankook Universitato kaj Budapeŝta Teknika Universitato subskribis la ĝemeliĝon de ambaŭ universitatoj. La ĝemeliĝo eblis per la klopodoj de Esperanto-Instituto de Dankook Universitato kaj d-ro Ottó Haszpra de Budapeŝta Teknika Universitato, estrarano de UEA. Oni povas diri, ke la afero okazis tute per Esperanto.

Jam de longe Esperanto-Instituto de Dankook Universitato laboris super la ideo, ke Esperanto povas kaj devas funkcii utile al la kunlaboro inter diverslandaj universitatoj. Ĝi komencis la laboron en la komenco de 1988, sendante leterojn al UEA-delegitoj, en kies urboj troviĝas la ĝemelaj universitatoj de Dankook Universitato. Kaj ĝi ne forgesis sendi la leteron ankaŭ al la estraro de UEA. D-ro Haszpra, estrarano de UEA pri scienca kaj teknika aplikado de Esperanto, estis la unua homo kiu reagis al nia propono. Plurfoje interŝanĝiĝis leteroj inter li kaj la Instituto, kaj rezulte de tio de la 20-a de januaro ĝis la 3-a de februaro 1989 du profesoroj de Budapeŝta Teknika Universitato, nome d-ro Haszpra kaj d-ro Janos Ginsztler, vizitis Dankook Universitaton por detale diskuti pri la ĝemeliĝo. Dum ilia vizito la efektiva laborlingvo estis

Esperanto. S-ro Ma Young-tae, aganta direktoro de la Instituto, kaj d-ro Haszpra tre harmonie kunlaboris por rezultigi bonan frukton. Dank' al ilia kunlaboro la du universitatoj finfine konsentis starigi ĝemelan rilaton inter si, kaj ambaŭ prezidantoj subskribis la konvencion, kiu estas skribita en ambaŭlandaj lingvoj kaj tradukita en Esperanton kaj la anglan.

La konvencio diras, ke la unua kampo de la interŝanĝo estas Esperanto kaj la dua estas ambaŭlandaj lingvoj kaj la tria estas ceteraj temoj. Tio estas ja epokfara, ĉar Esperanto aperis kiel la unua objekto de la internacia universitata interŝanĝo, kaj ankaŭ



D-ro Chang Choong-sik (maldekstre) kaj d-ro Lajos Fodor subskribas la konvencion: epokfara paŝo?

ĉar Esperanto efektive funkciis kiel reala laborlingvo en universitata kampo.

**Esperanto-Instituto de Dankook Universitato
8 Hannam-dong, Yongsan-Ku
Seoul 140-714, Korea Respubliko**

kia estu, socialismo? Al konkludo aŭ rezolucio ne eblis veni, sed la diskutoj mem frape ilustris la nuntempan malfermiĝon en la sovetia socio.

Menciindas ankaŭ la granda preteco de la organizantoj helpi al ĉeestantoj pri diversaj unuopaj petoj. Pri komplikaj kiel plilongigo de sovetiaj vizitoj, pluraj ĉeestantoj ricevis senhezitan kaj efikan helpon. Dum gazetara konferenco fine de la semajno leviĝis demando de pluraj partoprenantoj: ĉu eblas antaŭvidi plian internacian renkontiĝon estontece? La organizantoj hezitis menci konkratan lokon aŭ daton, tamen la sukceso de la minskaj semajno estas nepre kuraĝiga. Ni antaŭĝoju pri la reciproka riĉiĝo venonta de plua konatiĝo kun la sovetia Esperanto-movado.

Curt Ford (Usono)

UEA-kodo Skribante al la Centra Oficejo de UEA, bonvolu ĉiam menci vian "uea-kodon". Tiel via peto estos pli rapide traktebla, ĉar serĉado de informoj, kontado, skribado de leteroj ktp plej ofte okazas per tiu komputila kodo, kiu estas al vi unika. La kodo konsistas el kvar literoj, streketo kaj kvina litero (ekz. abcd-e), trovebla supre dekstre sur la adres-etikedo de via revukoverta. Dankon!

Fekunda tero en la Indus-valo

Mi pasigis preskaŭ monaton kun la pakistanaj esperantistoj, pri kiuj ni malofte aŭdas en Esperantujo. En Multano troviĝas la sidejo de Pakistana Esperanto-Asocio (PakEsA). Tie estas krome la plej nombra grupo de la lando, kaj preskaŭ ĉiutage lokaj esperantistoj renkontiĝas en la vendejo de la PakEsA-sekretario Muhammad NAEEM Javaid, interamikiĝante en familia etoso. La urbo havas la solajn regulajn kursojn en Pakistano, kiujn gvidas la prezidanto de PakEsA AMIR Bashir Bhatti. Laŭ li, grandajn problemojn kaŭzas la manko de bona lernolibro (ili uzas maldikan, kun malpli ol baza lernmaterialo kaj – bedaŭrinde – pluraj eraroj). “Post la baza lernado,” diris Amir, “ni ne povas progresi ĉar ni ne havas lernmaterialon por komencantoj.” Naeem aldonis: “Ni ŝatas kaj volas legi romanojn, precipe en facila lingvo.” Mi mem konstatis ilian bezonon de libroj pri la Esperanta gramatiko.

La kasisto de PakEsA, Muhammad SAJJAD Husain Nasir, konfesis al mi ke li praktike ne havas laboron ĉar la kaso estas malplena. Kiel aliloke en la mondo, la multanaj esperantistoj eltiras monon el siaj poŝoj por eldoni libretojn kaj la asocian bultenon (mendeblan de ĉiuj).

En Lahoro, unu el la plej grandaj kaj modernaj urboj de Pakistano, loĝas kelke da esperantistoj kaj pluraj simpatiantoj. Mirigis min tamen ke ili ne kunvenas, ne organizas kursojn, ne informas – kvankam ebloj ne mankas por tio. En interparoloj kun mi, multaj homoj diris ke Esperanto ne ŝajnas sufiĉe utila:

“Kiel kaj kiom mi povas profiti el ĝia studo,” ili demandas, kaj ne ricevinte kontentigan respondon ili perfektigas sian scion de la angla, lingvo necesa por la profesia kariero en Pakistano. Tamen ĉe la adiaŭo ili promesis fondi grupon kaj agi. Ĉu ili persistos? Kiu povas skribi al ili pri la utileco de Esperanto?

En Ĝelema, alia urbo survoje al Islamabado, estas du konstruaĵoj je la dispoŝo de la esperantistoj, sed ŝajnas al mi ke la ŝanco ne estas bone utiligata. Tamen en unu el ili kurso estis komencota sub la gvido de Abdul SALAM – en du grupoj, vira kaj virina, ĉar en ĉi tiu islama lando la du seksoj ne rajtas kunestadi: problemo kiu kaŭzis ke ĝis nun la pakistana esperantistaro konsistas nur el viroj.

En Ravalpindio mi renkontis unu el la plej malnovaj kaj aĝemaj aktivuloj en Pakistano, kiun konas multaj: Saeed Ahmad FARANI. Pro lia iniciato aperis artikoloj en la gazetaro, radioelsendoj, kaj foje eĉ 30-minuta televida programo pri Esperanto. Li ankaŭ eldonas librojn en aŭ pri Esperanto pere de sia Esperanta Panĝaba Akademio.

Eĉ pli veterana aktivulo troviĝas en Mario (Muree), malgranda, montara urbo proksime de Islamabado: Muztar ABBASI, kunfondinto de PakEsA, aŭtoro de la unuaj lernolibro kaj vortaro, aktiva precipe literature. En la urbo, loko de la someraj renkontiĝoj de PakEsA, situas ankaŭ la Esperanto-Domo de Amjad BUTT kaj AL-MAIDAH, kaj restoracio de esperantisto Rehman Danish.

Superrigardante la pakistanan movadon, oni povas konstati ke en ĝi aktivigas precipe junuloj. Inter la proksimume 90 membroj de la asocio, ne pli ol 20 povas paroli la lingvon; nur en Mario kaj Multano okazas regulaj kunvenoj. Sed ĉe la civitanaro, Esperanto ofte vekas interesiĝon. Certe miloj da homoj lernus

KULTURO

TEAM' reklamas ne nur silenton!

En 1981 la partoprenantoj de Internacia Junulara Konferenco en Dolný Kubín ĝuis rokkoncerton en Esperanto. Nenio tre aparta, vi eble pensas. Temis pri kelkaj junaj slovakoj, eksmembroj de tri disfalintaj rokensembloj: Troll, Elektra A kaj Midd, kiuj proksimume samtempe malkovris Esperanton kaj fondis novan grupon, sub la kunmetita nomo TEAM'. Nu, amatoraj grupoj ne tiom maloftas en Esperantujo. TEAM' partoprenis kelkajn slovakajn E-aranĝojn, aperis ĉe la sonbenda gazeto de LF-Koop, kaj poste ŝajne eniris la tombon de silento. Ĝiajn membrojn trafis la deviga soldatservo.

Sed TEAM' ne mortis. Ĝiaj anoj plu fidelis, kaj post la militservo rekomencis ludi kune. La gajno de kelkaj sukcesoj ĉe enlandaj festivaloj kaj konkursoj decidigis ilin profesiiĝi, por plu evoluigi sian spontan, rekte-komunikan stilon. La iama gvidinto de ilia Esperanto-kurso, Stano Marček (konata interalie kiel la redaktoro de *Esperantisto slovak*), transprenis la rolon de manaĝero. Iom post iom la koncertejoj pleniĝis, venis pli kaj pli da invitoj, produktiĝis la unua granda disko – kiu disvendiĝis en 120 000 ekzempleroj kaj 50 000 kasedoj ene de kvin monatoj. TEAM' subite trovis sin ĉe la pinto de la rokmuzika mondo en Slovakio.

Denove nenio tre aparta – se la TEAM'-anoj ne fidelus al pli ol la muziko. Sed ĉe la nun preskaŭ ĉiutagaj koncertoj ili prezentas unu-du kantojn en Esperanto, rakontas iomete pri ĝi ĉe la gazetaro, radio kaj televido – kaj faras planojn por nova lanĉiĝo en la Esperanta mondo. Ĉe la ŝtata eldonejo OPUS la grupo registris sian furoran diskon *Reklamo al silento* ankaŭ en Esperanto: ĝin disvendos ekster Ĉeĥoslovakio la kooperativo de



Literatura Foiro, ne nur diske sed ankaŭ kasede kaj verŝajne kompaktdiske. (Menciindas, ke la komercaj intertraktoj okazis en Esperanto.) Ĉe la Internacia Junulara Kongreso en Kerkrade, Nederlando, kaj la Universala Kongreso en Braĵtono, Anglio, TEAM' koncertos, ebligante al almenaŭ kelkaj miloj da homoj konatiĝi senpere kun ĝia stilo. Post tio la evoluo dependos de la movado mem. Ĉar temas pri ses muzikistoj kaj ses akompanaj teknikistoj diversspecaj, oni devas antaŭvidi minimume kelcenton da aŭskultantoj por pravigi inviton; sed – kiel komentis Stano Marček: “Mi ne scias, ĉu vi imagas, kian propagandilon por Esperanto ni havas enmane!”

la lingvon se ekzistus ebloj por tio. Ankaŭ la amaskomunikiloj estas malfermaj.

En la plano por la agado, PakEsA antaŭvidas pliajn kontaktojn kun la internacia movado – eble ankoraŭ ĉi-jare ĝi fariĝos aligita Landa Asocio de UEA – kaj gravan rolon por la Esperanta turismo. “Ni povas aranĝi restadon de esperantistoj en nia lando, tiel riĉa el turisma vidpunkto,” emfazis plurfoje Naeem, kiu kiel reprezentanto de la pola Esperantotur jam antaŭvidas la unuan karavanan viziton.

Se vi havas ideojn, proponojn, demandojn, skribu al PakEsA laŭ la adreso de la sekretario (la oficiala adreso ŝanĝiĝis): Muhammad Naeem Javaid, 37/8 inside Haram Gate, PAK-60000 Multan, Pakistano.

Multlingveco ne estas baro en Bharato

En Bharato (aŭ Hinda Unio), unu el la plej grandaj kaj kulture riĉaj landoj en la mondo, mi pasigis entute kvin semajnojn, kvankam nur en Novdelio, Kalkato kaj Bangaloro.

En la ĉefurbo Novdelio mi trovis kelkajn restintajn esperantistojn el la ora epoko de Hinda Instituto de Esperanto, kiu antaŭ pli ol dudek jaroj estis unu el la plej aktivaj centroj en Azio. Hodiaŭ la lokaj esperantistoj ne estas aktivaj; multaj aliaj aferoj okupas ilin. Ili tamen parolas bone. Post nia renkontiĝo ili decidis reorganizi sin por kune agi; kontribuu mem pere de la adreso Krishna K. Bhatia, III-H-208 Nehru nagar, Ghaziabad. IND-201009.



En Kalkato – la ĉefurbo de la ŝtato Okcidenta Bengal – troviĝas la sidejo de Federacio Esperanto de Bharato. La tiea movado estas komparebla al multaj urboj en Eŭropo: tra la jaro okazas unua- kaj duagrada kursoj en kolegio, kutime por ĉ. 40 personoj. Kursoj okazas ankaŭ en tri aliaj E-centroj, kaj multaj infanoj lernas la lingvon en la lernejo. En la regiono nun loĝas proksimume 500 finstudintoj de kurso, inter kiuj eble 100 povas uzi la lingvon por interkompreniĝi. Eĉ mankon de lernolibroj oni ne sentas: estas uzataj du libroj de S. S. PAL kaj unu kvarparta verko de Badal SIRCAR. Baldaŭ la kalkatanoj ekfunkciigos tutlandan korespondan kurson. Pluraj dekoj da aktivuloj renkontiĝas ĉiusemajne en kristana lernejo.

En vilaĝo proksima al Kalkato mi renkontis esperantistan familion. La filino, 15-jara Sovona, verkas Esperantajn kantojn kaj poemojn; ŝia patro Prithwis instruas la lingvon al vilaĝanoj, malriĉuloj, analfabetoj, kiuj – laŭ lia aserto – amas la ideon.

Tio kion precipe bezonas la kalkataj esperantistoj estas vizitoj de eksterlandanoj. Vi povas esti certa pri kora akcepto; skribu al S. S. Pal, 35/1 Swami Vivekananda Road, Howrah, IND-711101.

La 7-an de aprilo 1989 fondiĝis Bangalora Esperanto-Centro en la ĉefurbo de la suda ŝtato Majsurio. Tion realigis precipe S. S. PRADHAN (dekstre en la foto), sub kies aŭspicio mi gvidis dusemajnan kurson kiun finis 56 personoj. Vi povas imagi ke nun ili volas korespondi, ricevi konsilojn kaj eble eĉ legmaterialojn; skribu al Bangalora Esperanto-Centro, 97, 24th Cross, III Block East, Jayanagar, Bangalore, IND-560011.

Ĝenerale pri la agado en Bharato mi interparolis kun la organizanta sekretario de FEB, P. V. RANGANAYAKULU. Li diris ke la FEB-listo ampleksas 300 adresojn, kaj 100 esperantistoj en la lando bone parolas la lingvon. Pli ol 50 vivas izole en diversaj partoj de la lando: krom en Kalkato, nur en Laknaŭo (Lucknow) ekzistas regule kunvenanta grupo ĉ. 20-persona. En siaj planoj FEB havas la konstruon de Esperanta domo, sur terpeco proksima al Kalkato kiun donacas riĉa apoganto de la lingvo. Aliaj planoj estas la eldono de lernolibroj en la plej vaste parolataj lingvoj de Bharato, kaj efika unuigo de la esperantistoj en la tuta lando kiel federacio, kun fondo de movado en ĉiu ŝtato. Por tio laboras precipe Prabir Kumar BASU.

Iom surprizis min la opinio de Ranganayakulu, ke “en Bharato la movado ne kreskas kaj ne kreskos, ĉar ĉiu devas lerni tri lingvojn. Esperanto estos ĉiam la kvara.”. Mi persone havas kontraŭan opinion. En Bharato mi sentis kaj vidis ke la homoj ĝenerale neniam aŭdis pri Esperanto. Kiam ili ekscias pli detale, ili ne nur favoras sed ankaŭ volas lerni; la tasko estas doni al ili tiun eblon. Malgraŭ siaj multaj lingvoj Bharato ne estas escepto.

Joachim Werdin



El la slovakaj gazeto *Smer* (95 000 ekz.):

“La rekantaĵo de *Reklamo al silento* estas konata ankaŭ al infanoj en infangardenoj...”

Reklamo al silento

Televid’ reklamas ja la silenton nun ĉiu jam ekflamas pro bela oportun’

Al silent’ reklamo vera furoraĵ’ importita silenteg’ plej necesa aĵ’

Eblas en kaŝ’ la silenton de arbar’ havi por via dom’ estas garantio, indas la far’ akiros ĝin plej ruza hom’

Vico antaŭ fremd-butik’ longas pli kaj pli sed silenton, kara amik’ baldaŭ havos ni

Konservita en skatol’ freŝa kiel lili’ tiel enormas la feliĉ’ ke ektimas ni . . .

DLT survojas al industriskala produktado

La 29-an de marto 1979 preskaŭ okazis tragedia trafikakcidento. La programar-inĝeniero Toon Witkam stiris sian aŭton tra la ĉiuvesperaj aŭtoserpentoj de la nederlandaj ŝoseoj, kiam subite, aŭskultante radion, li ekhavis la ideon konstrui tradukkomputilon por komunikado-retoj, funkciantan per intera tekstofonto en Esperanto. Ne tuj konsciiĝante pri tio, kiom da ŝvito tiu eta ideo ankoraŭ kostos al li, Witkam nek svenis, nek ĉesis atenti pri la trafiko, kaj la akcidento feliĉe ne okazis.

El la aŭtoŝosea ideo fariĝis multimilionguldena projekto ĉe la programar-entrepreno BSO en Utrecht por la evoluigo de tradukanta komputilsistemo, nomita *Distribuita Lingvotradukado* (DLT). DLT estos multlingva sistemo. Per ĝi, persono sen scio de fremda lingvo povos sendi tekston al aliaj personoj, kiuj ricevos ĝin en aliaj lingvoj. La entajpanto de la teksto devas per respondado de kelkaj komputile generitaj demandoj helpi al la sistemo "kompreni" la tekston. Tiu dialogo kun la uzanto okazas en la lingvo de la teksto, kaj la rezultanta traduko ne bezonos korektadon fare de tradukisto.

Tiaj estas la planoj. Dek jarojn post la invento la projekto jam atingis konsiderindajn sukcesojn kaj troviĝas en plena progreso. Traduki tekston el ordinara homa lingvo en alian estas altgrade kompleksa intelekta ago. Realigi la samon per komputilo, kiu finfine ne havas intelekton, estas des pli malfacilega (sed ankaŭ defia) tasko. Ne mirigas do, ke DLT estas multjara projekto. Ĝi evoluas esence laŭ la jenaj kvar fazoj:

1979-1983	preparstudoj
1984-1988	evoluigo de prototipo
1989-1990	preparo de la produktada fazo
1990-	industria produktado

Fininte en 1988 prototipan version de la traduksistemo, kiu tradukas el angla teknika lingvaĵo tra Esperanto kiel interlingvo al la franca, la DLT-laborgrupo nun plenintense utiligas la spertojn, gajnitajn dum la prototipa fazo, por ellabori integritan kaj akordigitan tuton da planoj kaj priskriboj por *efektiva industria traduksistemo*. Oni nun antaŭvidas surmerkatingon unue en formo de sistemo uzata interne de unu-du kunlaborantaj firmaoj por limigita teknika lingvaĵo en ilia produkt-dokumentado k.s. Post enkonduko de tia sistemo ne antaŭ 1993 oni plulaboros por forigi la gramatikajn kaj vortprovizajn limigojn de tia lingvaĵo por ebligi ĝeneralan surmerkatingon kelkajn jarojn poste. La nunaj planoj celas al du porcioj de po ses lingvoj. Verŝajne aldonotaj lingvoj post la nunaj (angla kaj franca) estas la germana, itala kaj hispana. Lingvoj kiel la japana, la ĉina aŭ la rusa sekvos en la dua porcio.


La nova DLT, kiu dum la nunaj monatoj estiĝas sur la papero (nu, fakte sur tekstprilaborekranoj) de la DLT-anoj, estos karakterizita de zorge ekvilibrita kunfunkciado de elprovitaj kaj fidindaj teknikoj kun avangardaj, teknologie kaj lingvoteorie novspecaj metodoj. La ĉefaj eksteraj trajtoj de DLT restos sensanĝaj, kiaj ili estas en la nuna prototipo (kaj jam estis en la aŭtoŝosea invent-ideo). La interna konsisto de la tradukilaro tamen dank' al la spertoj, akiritaj per la prototipo, grave ŝanĝiĝis en esencaj terenoj. Sen ŝanĝi ĉi tiun revuon en komputlingvistikan fakgazeton, tamen eblas skizi la novan funkciadon de DLT laŭ kvar punktoj.

Lingvo kiel scio-reprezentilo

Oni delonge scias, ke tradukado ne eblas sole surbaze de la (morfologia, sintaksa k.s.) formo de vortoj kaj frazoj. Necesas kompreni ankaŭ ilian signifon. Kompreno premias scion, kaj por simuli komprenon tradukanta komputilsistemo do devas simuli scion. "Perscia tradukado" en la faktereno estas ŝlosilvorto de la nuna jardeko. Komputilo tamen ne povas simple "scii" ion, kiel scias homo, sed ĝi bezonas scion skribitan en iu aŭ alia formo. Tiam eksplicitan notformon de komputila "scio" oni nomas *scioreprezentajo*.

DLT estas bazita sur la ideo, ke la plej bona scioreprezentajo estas la homa lingvo. Komence de la prototipo-fazo oni ĉe DLT elprovis diversajn manierojn esprimi signifo-rilatojn inter vortoj. Okazis eksperimentoj pri semantikaj atomoj, t.e. plej malgrandaj, ne pludivideblaj unuoj de signifo, el kiuj devus eble konstrui la signifon de ajna vorto aŭ esprimo el ajna lingvo. Montriĝis, ke tiaj lingvo-sendependaj bazelementoj ne ekzistas. Okazis eksperimentoj pri klasado kaj etiketado de la eblaj enhavaj rilatoj inter ekz. verboj kaj la vortoj determinataj de ili. Montriĝis, ke tiajn etiketojn, kutime nomatajn semantikaj roloj aŭ profundaj kazoj, ne eblas difini en translingve valida maniero. La DLT-prototipo, pretiĝinta en 1987 kaj en reviziita formo komence de 1988, tial ne enhavas tiajn esence nelingvajn esprimilojn, sed sole lingvaj. La DLT-anoj ne perdis multe da tempo per debatoj pri tio, ĉu la subjekto de *donas*, *ricevas*, *batas*, *staras* kaj *kreskas* estas ĉiam aganto, aŭ eble ĉe iuj el la verboj aganto kaj ĉe aliaj agato, medio de stato aŭ io alia. Oni preferis esprimi la rilatojn per la rimedoj de la lingvo mem. Ĉar tiu lingvo estas Esperanto – kvankam la supraj principoj ja validas por ĉiu ajn homa lingvo – eblis eĉ aparte konciza esprimmaniero, nome la morfemo kies unika funkcio estas signi la koncernan rilaton, en la ekzemplo *as*. Laŭ simila maniero estas konstruita la tuta sciobanko, kiu ebligas al semantika ekspertsistemo la taskon de "komprenado" en la nuna DLT-prototipo.

Ĉi tiu prefero de lingvaj esprimiloj al eksplicitaj etiketoj k.s. baziĝas sur la principo de *impliciteco*. La ĝisnuna DLT-prototipo sekvas ĝin ĉefe sur du terenoj: Unu estas la prefero al Esperantaj morfemoj kiel semantikaj rilatiloj. La alia estas metataksa. Metataksa estas gramatika regularo por traduki per tio, ke oni unue faru la transiran paŝon de unu lingvo al la alia sur strikte sintaksa nivelo sen entute pensi pri la signifo. Tiel oni el unu tradukenda frazo produktas amason da alternativaj, sed ĉiuj sintakse korektaj eblaj tradukoj. Nur kiam tio estas farita, oni komencas interesiĝi pri la signifo kaj laŭ tio elekti la kuntekste plej taŭgan el la alternativoj. La avantaĝo estas, ke en la




La du dimensioj de la dulingva tekstobanko: traduka scio estas reprezentita en la tradukunuoj el du samsignifaj tekstpecoj (horizontalaj ligoj);

sistemstrukturo de DLT tiu semantika elektoproceso povas okazi komplete en Esperanto, tiel ke la koncernaj moduloj estas uzeblaj por tradukoj el ĉiu ajn origina lingvo, ĉu franca, ĉu dana, ĉu ĉina.

Ĉerpi scion el tradukoj

La pluevoluigo de DLT baziĝos sur aro da lingvoteknologiaj inventoj, kiujn DLT-anoj lastatempe faris, inspiritaj de la spertoj kun la unua prototipo. Unu el ili estas ankoraŭ multe pli radikala daŭrigo sur alia tereno de la principo de impliciteco. Tio estas la invento de *dulingva sciobanko*. (Ĉu vi miras, ke ni tiel distrumpetas niajn komercajn sekretojn? Ne timu, ili estas protektitaj per patentoj.) Impliciteco estas bela vorto por priskribi ecojn de la traduksistemo sur abstrakta lingvistika nivelo. La ideo de dulingva sciobanko montras tamen, ke impliciteco havas ankaŭ tute konkretan kaj praktikan aspekton.



ĝenerala mondoscio estas reprezentita per la tekstoj mem kaj la (vertikalaj) ligoj inter parte aŭ tute identaj konceptoj en ili.

La funkcio de dulingva sciobanko estas plej bone komprenebla en la perspektivo de la evoluo de sciobanko – vortaroj – por perkomputila tradukado. Unue oni faris komputilajn vortarojn laŭ tradicia maniero. Leksikografoj elpensis por ĉiu unuopa kapvorto ĉiujn eblajn tradukojn en kutimaj kaj nekutimaj, ĉiutagaj kaj fakaj uzoj. Tio estas longdaŭra, pena laboro, tre verŝajne neniam vere kompletebla. Kiel duan ŝtupon oni povas faciligi tiun laboron disponigante al la vortaristoj grandegan kvanton da tekstoj en la koncernaj lingvoj, en kiuj eblas kompute serĉi ĉiujn uzojn kaj kuntekstojn de la koncerna vorto (t.n. konkordanco en tekstobanko). Triaŝtupo eblas aŭtomate transformi pecojn de

teksto en vortar-artikolojn kaj submeti tion al la fina juĝo de la leksikografo. Tio premias, ke la tekstoj ne estu simplaj vortovicoj kiel ĉi tiu artikolo, sed ili devas jam esti sintakse analizitaj (parsitaj) kaj ekipitaj per aro da aliaj tekststrukturadaj ligiloj, kiel ekzemple indikiloj de pronomoj al la vortoj, kiujn ili reprezentas. Se oni tamen jam antaŭrilaboras la enhavon de la tekstobanko en tiu maniero, oni povas, kvaraŝtupo, ĉerpi la necesan scion *rekte el la prilaborita teksto mem*, anstataŭ unue generi vortar-artikolojn kaj poste uzi tiujn dum la tradukado.

La dulingva sciobanko aplikas ĝuste tiun kvaraŝtupan metodon. Ĝi tion faras tamen ne en normala unulingva tekstobanko, sed en tekstobanko, kiu enhavas tekstojn paralele kun iliaj tradukoj. La prepara prilaboro de la paralelaj tekstoj – kiu ne povas esti aŭtomatigita komplete, sed inkluzivas konsiderindan aproban, kontrolan kaj korektan agadon de homoj – ampleksas ankaŭ la identigon de vortoj kaj vortgrupoj en unu lingvo kun iliaj tradukoj en la alia lingvo. Ĉi tiu paralelteksta solvo estas maniero reprezenti tradukoscion nekutime implicate (vd. ilustraĵon).

Por povi plenumi sian funkcion en la konstruata sistemo, la scioteknologie tute novtipa invento de tradukado per dulingva sciobanko evidente devas esti ekipita per ankoraŭ unu grava

Malrigora gramatiko

kapablo. Kiel ajn ampleksa tekstobanko estas, la statistiko instruas, ke proksimume la duono de la vortoj aperas nur po unu fojon. Tio indikas, ke eĉ grandega tekstobanko nepre ne povas enhavi ĉiun ajn vorton en ĉiu ajn sintaksa rilato, ĉiu ajn semantika kombino kaj ĉiu ajn pragmatika interpreto. Dulingvan sciobankon tial esence devas akompani mekanismoj por *ĝeneraligi* sur ĉiuj niveloj de la gramatiko. Ĝi do bezonas morfologiajn, vortfaradajn, sintaksajn, semantikajn kaj aliajn gramatikajn regulojn. La scio pri la reguleco en la strukturo de la lingvoj fakte estas premiso por apliko de la dulingva sciobanko al tekstoj, kiujn la tekstobanko ne jam enhavas.

De tiu premiso estas mallonga paŝo al la ideo, apliki la ĝeneraligivon ankaŭ al alia fenomeno. Tio estas la fakto, ke preskaŭ neniuj tekstoj komplete observas la regulojn starigitajn de la preskriba gramatiko. Pli-malpli ĉiu teksto enhavas neregulaĵojn, erarojn kaj nekutimajn elementojn. Kompreneble oni povus devigi la uzantojn de komputila sistemo skribi laŭregule, sed tia klient-malafabla eco igus la laboron per la traduksistemo forte malagrabla, dum ĝi ja devus esti ĝuste faciligo por kiu oni pretu pagi altan prezon. Prefere la sistemo do kapablu trakti ankaŭ iom erarajn tekstojn kaj eventuale proponu korektojn al la uzanto, kiujn tiu nur bezonus akcepti aŭ korekti.

La kapablo trakti tekstojn de iom neantaŭvidebla formo estas alia versio de la kapablo ĝeneraligi pri fenomenoj trovitaj en la sciobanko. La nova DLT tial enhavos gramatikojn, kiuj funkcios per kerno da strikte validaj reguloj, kaj samtempe ĝi ne tuj malakceptos ĉion nelaŭregulan, sed klopodos per metodoj de statistika kaj versajneca rezonado trovi solvojn ankaŭ por neatenditaj kazoj, erara entajpaĵo ktp. Alia el la novaj inventoj de la DLT-anoj estas sintaksa analizilo (parsilo), kiu funkcias kun striktaj reguloj en la kerno kaj statistike malrigorigita gramatiko por la margeno.

La unikeco de Esperanto

La dulingva sciobanko kiel baza rimedo por la simulo de kompreno en perkomputila tradukado ŝovas la akcenton de la ĝisnuna nuresperanteco de la semantikaj procesoj en DLT al lingvopara traktado. Ĉu Esperanto per tio perdis sian unikan centran rolon en DLT? Ĉu la sama metodo estus realigebla per paro da ajnaj etnaj lingvoj? Mi kredas ke ne. Ankaŭ en la nova DLT restas kerne grava rolo de la interlingvo, ke eblu plu-traduki el ĝi al ajnaj cellingvoj tutaŭtomate (dum en la traduko al la interlingvo homo devas helpi). Tiu speciala traduktaŭgeco laŭ la juĝo de ĉiuj fakuloj ne ekzistas en etna lingvo. Esperanto kombinas en si la precizecon, necesan por tiu funkcio, kun la esprimivo de homa lingvo. Tiun nekutiman kombinaĵon de ecoj Esperanto posedas ĉar ĝi (kontraste al etnaj lingvoj) komence de sia evoluo estis artefarita simbolaro, sed poste (kontraste al nun elpensataj komput-lingvistikaj simbolaroj) per centjara uzado fariĝis plenfunkcia homa lingvo. Aldone al tio, la fakto, ke unu el la du lingvoj en DLT-sciobankoj ĉiam estas Esperanto, altgrade faciligas la rezonadon, kiun la semantika sistemo devas fari por traduki per la scio kiun ĝi enhavas. Esperanto faciligas la interplektadon de gramatikaj kaj referencaj rilatoj (aldonataj dum la prepara prilaboro de la sciobank-enhavo) interalie per du el siaj karakterizaĵoj. La unua estas ĝia produktiva sistemo de vortfarado kaj la dua la fakto, ke ĝia ĉefa funkcio estas internacia komunikado. Ĉi-lastata eco sufiĉgrade malhelpas la formadon de idiotismoj, kiuj ja abundas en etnaj lingvoj.

DLT kaj la esperantistoj

La supraj kvar sekcioj skizas kelkajn gravajn trajtojn de la nova versio de DLT. La pasintaj dek jaroj da DLT-evoluigo montris, ke la esplorprojekto pli kaj pli akiris la atenton, la

interesiĝon kaj ankaŭ la kunlaboremon de multaj esperantistoj. Tial mi ĉi tie iom prilumu la eblecojn kunlabori en DLT nun kaj estontece.

Komence de 1988 DLT lanĉis la ideon de dua DLT-centro. La eŭo kaj la pluevoluo de la planoj pri DLT estis tiaj, ke nuntempe ne plu estas antaŭvidita unusola centro aldone al Utrecht, sed specifaj kunlaboroj kun diversaj lokoj pri malsamaj fakterenoj. Pro la ideo de dulingva sciobanko, gravas por DLT ke okazu grandskala tradukado de fakaj tekstoj el etnaj lingvoj al Esperanto. (Interesa temtereno estas ekzemple komputilaj programar-dokumentoj, sed ankaŭ aliaj temoj gravas.) Malgranda laborgrupo, taskita de DLT, jam ekaktivis tiusence ĉe IKS en Zagrebo. En la universitato de Budapeŝto, grupo de lingvistoj aplikas la gramatikan modelon de DLT al tradukado inter la hungara kaj Esperanto. Malpli grandskalaj kunlaboroj ankaŭ realiĝis kun unuopaj fakuloj dise en la mondo. Tradukado, precipe faka, premisas bonan progreson sur la tereno de *terminologio*. DLT tial kun vigla intereso sekvas la agadon de la Esperantaj terminologoj, nelaste tiuj en TEC. (Vd. apartan artikolon. –red.)

Perspektivo

La nuna fazo de la projekto DLT, dediĉita al ellaborado de detalaj konstruplanoj, alportis plurajn bonperspektivajn inventojn, kiuj bele harmonias kun la konstruprincipoj de DLT. Samtempe esperige evoluas la komercaj traktadoj pri la investoj, bezonataj por konduki la aŭtoŝosean ideeton al internacie prospera kaj konkurenciva sistemo, kiu igos la servojn de aŭtomatigitaj oficejoj alireblaj en la lingvo de la klientoj.

Klaus Schubert

TERMINOLOGIA ESPERANTO-CENTRO

Defiaj perspektivoj

En septembro 1987 ni elstarigis la fondon de la Terminologia Esperanto-Centro de UEA kiel unu el la plej signifaj paŝoj en la Jubilea Jaro. Intertempe ne multas la informoj pri TEC. Atentaj legantoj eble rimarkis, ke TEC-sekretario I. Bujdosó demisiis, ke la bonhavo de Fondaĵo Wüster plu kreskis, ke okazis kunsido en Roterdamo, ke terminologiaj seminarioj estas daŭre organizataj en Ĉeĥoslovakio kaj aliloke. Jen nun, finfine, iom da pli detalaj novaĵoj.

La kerno de TEC, jam ekde la komenco, konsistas el dekkvino da spertaj aktivuloj, kiuj de jaroj funkciigas altkvalitan Scienc-Teknikan Sekcion de Ĉefia Esperanto-Asocio: inter ili la nuna sekretario Jiří Laube (Kratochvilova 969, CS-413 01 Roudnice n.L.), same kiel la estro de la Sekcio de Normigo, Jan Pospíšil (Leningradská 3112, CS-272 04 Kladno–Rozděllov). El lastatempaj TEC-bultenoj oni rimarkas kreskantan internaciecon de la kunlaborantaro – kiu tamen restas baze mez-eŭropa, kun unuopaj reprezentantoj en aliaj landoj.

Eklaboris ĝis nun “terminografiaj komisionoj” pri stomatologio kaj komputiko, kaj esperantologia komisiono pri la konflikto inter paralelaj *h*- kaj *k*-formoj (ekz. *teĥniko/tekniko*). Gvidantojn havas jam similaj komisionoj pri medicino, agrikulturo, gisfako kaj astronomio, kaj TEC celas prioritare starigi aliajn pri komerc-ekonomiko, komerc-juro, informadiko, politiko kaj kulturo. La komisionoj duon-formale grupigas samfakulojn por proponi kaj diskuti terminojn. La fina celo de

APLIKADO

Komerca entrepreno – kaj aŭdaca eksperimento

Estas spuroj pri iu kresko de ambicio, de entreprenemo en la Esperanto-movado. Ne nur la ĉinoj kaj sovetianoj strebas al scienca-teknika-komerca kunlaboro trans antaŭnelonge malfermitajn limojn. Ankaŭ okcidente aperas pli kaj pli da homoj, kiuj pretas riski tempon kaj monon je la praktika, profita utiligo de la internacia lingvo.

Unu tia estas Alexandre Rousset, la 27-jaraĝa direktoro de la registrita franca firmao Interland. Rousset unue suriris ĉi tiujn paĝojn kiel studento pri komercaj sciencoj kiu staĝis ĉe la esperantistoj en Bolivio (*Esperanto* 1986/p. 4-6). Konvinkita pri la realaj komercaj ebloj de la lingvo, li evoluigis siajn ideojn ĝis plena projekto. Pri ties lanĉo aperis tutpaĝa anonco en ĉi tiu revuo, junio 1988. “Ĉar la ekonomia medio estas la plej grava nuntempe kaj influas la politikajn decidojn same kiel nian ĉiutagan vivon, Esperanto devos pruvi sian efikon sur tiu grundo se ĝi volos agnoskiĝi kaj amase uziĝi,” li argumentis tie. Skeptikulo verŝajne respondus, ke tion oni diris jam cent jarojn. Ĉu Rousset vere proponas ion, kio povas konvinki la nemovadan mondon?

Lia unua kaj ĉefa koncepto estas, ke Esperanto proponas finance avantaĝan kaj pli kontentigan komunikilon al internaciaj firmaoj, kiuj ne alimaniere solvis siajn lingvajn problemojn. “La praktikan aplikadon de la rezultoj el tuta jarcento da interlingvistikaj esploroj,” reklamas franc-lingva Interland-folio. “La samtempa lernado de tia lingvo . . . certigas maksimuman efikecon en la interna komunikado, koste de minimuma intelekta

kaj mona investo,” precizigas alia – kaj poste konfesas: “Oni povus esti skeptika pri la ŝancoj de tia servo. Sed . . . la unua kliento de Interland estis nederlanda firmao, konvinkita pri la prudenteco de tia novismo sekve de siaj problemoj pri uzo de la angla en fabrikoj en Eŭropo kaj la Fora Oriento.”

Interland proponas 75-horan kurson pri Esperanto al interesitaj firmaoj. La malfacilaĵo pri la ideo similas tiun, kiun frontis Zamenhof en 1887: kiel konvinki la unuajn klientojn, ke la ideo valoras? El la varbiloj evidentiĝas plena konscio pri tiu problemo. Interland entreprenas ankaŭ aliajn servojn, malpli radikalajn: la organizon en Parizo de ekspozicio pri eksterlandaj laboreblecoj, tradukservon en aziajn lingvojn, la eltrovon de taŭgaj partneraj firmaoj en aliaj landoj sen postuli la uzon de Esperanto. “Venki la unuan hezitemon” nomas tion la reklamiloj.

Malfacile direblas, kioman longperspektivan ŝancon havas la projekto Interland. Ĝi paŝas sur nekonata tereno, kaj ĝiaj argumentoj havas la tutan jarcentan historion de Esperanto malantaŭ si. Se ĝi sukcesos, eĉ ĉe nur kelkaj firmaoj, tio lanĉos ege interesan eksperimenton. Ĉu Esperanto efektive funkcios kontentige en pure komerca situacio? Ĉu sentiĝos problemoj pri la terminaro por tiu aŭ alia kampo de la komerco? Ĉu iuj instruoj poste aliĝos al la movado, sentante emon apliki la lingvon pli vaste ol ĉe la laborejo? Reklamante la konkludojn de la interlingvistiko, Interland potencie fariĝos interlingvistika esploro mem.


Por pliaj informoj skribu al Interland, 8 rue de l'Eglise, F-95520 Osny, Francio; tel. +33 (1) 30 30 39 94.

mf

tio estas interkonsento pri "normo" – sistema aranĝo de nocioj, kun rilataj terminoj kaj klarigoj – kiun oni ellaboru surbaze de detala TEC-gvidlinio, siavice bazita sur la metodoj de Internacia Normiga Organizaĵo. Tiun procedon helpas kunordigi "ĝeneralaj terminografiaj komisionoj", ĝis nun starigitaj por la larĝaj fakoj tekniko, kemio kaj biologio.

La postan stadion en la laboro de TEC plenumas la Normiga Sekcio, kiu kontrolas kaj registras kvar-ŝtupan aproban proceduron por la rezultoj de ĉiu komisiono. (Aprobon devas doni la Normiga Sekcio mem, la TEC-komitato, la landaj kaj fakaj asocioj, kaj la Akademio de Esperanto.) Oni jam disponas pri proponitaj sistemaj terminaroj – t.e. terminaroj kompilitaj laŭ la TEC-metodiko – en la fakoj:

- peltindustriaj operacioj, feloj kaj peltoj;
- brodaĵoj;
- hidraŭlaj meĥanismoj;
- terminologio;
- aernaŭtiko kaj kosmonaŭtiko;
- stomatologio;



Toon Witkam, la DLT-gvidanto, prelegas en Roterdamo: maŝintradukado postulos grandajn terminologiajn evoluojn.

- teorio de varm-interŝanĝo;
- gisfako;
- akustiko;
- fizikaj grandoj kaj unitoj.

La normiga sekcio enkomputiligos tiujn normproponojn, tiel ke ili estos mendeblaj de interesataj fakuloj por utiligo, prikomento kaj kompletigo.

Vi eble demandas vin, kiugrade internacia estas tiu laboro. Efektive ekzistas problemoj. La gvidanto de la stomatologia komisiono, ekzemple, raportas ke "pluraj kolegoj ne plenumis la promesitan revizion de la unua versio de stomatologia terminaro; eĉ pluraj stomatologoj kompilas siajn proprajn enciklopediojn pri stomatologio!" Ankaŭ aliaj komisionoj notas, ke malmultaj reagis al kunlaborpropono. Vera internacia diskuto postulas konsiderindan laboron kaj monon flanke de la gvidanto. Fakaj libroj en Esperanto estas ofte haveblaj nur okcidente. Oni agnoskas la gravecon de la partopreno de ekstereŭropanoj en la laboro, sed praktike ne solvis la problemon de komunikado, ekzemple kun Ĉinio. Kaj tiel plu.

Sed estas ankaŭ esperigaj novaĵoj. TEC starigis kontaktojn kun diversaj terminologiaj institucioj, inkluzive de Infoterm, internacia centro en Vieno kiu laboras kadre de Unesko. Sekve de la DLT-konferenco pri maŝina tradukado en Budapeŝto (vd.

Esperanto 1988/p. 208), TEC ricevis inviton membriĝi en TermNet, la internacia kontaktreto de Infoterm. La kontaktoj cetere jam rezultigis la transdonon de valora heredaĵo de la terminologia pioniro kaj esperantisto Eugen Wüster al Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. Infoterm-ano Regina Thaller lernis Esperanton per trimonata koresponda kurso kaj prelegis ĉe la movadologia seminario en Ahrenshoop, GDR, en decembro. La ligoj inter la Esperanta kaj la internacia terminologio do iom post iom fortiĝas.

Tiu fortiĝo kunportos plurajn problemojn por TEC. La 40 "ŝlosildokumentoj" de Infoterm ampleksas preskaŭ 700 paĝojn en la angla aŭ germana: unua paŝo estus do ilia esperantigo, kio prezentas per si mem defian taskon. Aktiva partopreno en internaciaj konferencoj praktike postulas fluan regon de la angla kaj fincan sendependecon. Ne eskapeblas la konkludo de TEC-reprezentanto Wera Blanke (O.-Nagel-Str. 110, Pf. 113-05, DDR-1141 Berlin), ke "la fortoj de TEC en sia nuna konsisto ne sufiĉas... Necesas la helpo de la movada intelektularo." Ĉu oni aŭdos la alvokon?

mf

Sciendaĵoj por lingvokonsciuloj

Terminologia kurso. Jan Werner. Roudnice n.L.: Sdružený klub ROH, 1986. 88p. 21cm. 12,00 gld.

La dense tajpita materialo, kiu fakte kompareblas kun 160-paĝa normalformata libro, portas la subtitolon "Manlibro" kaj estis eldonita por ŝajne la unua terminologia kurso en la historio de Esperanto (Roudnice n.L., 1-5 septembro 1986).

Jan Werner, kiu publikigis diversajn studojn pri terminologia normigado, verkis detale strukturitan bazan materialon pri la problemoj, principoj, metodoj de la formado de terminoj kaj ellaborado de fakvortaroj. Fakte temas pri la unua provo kompili ĉiujn ĉefajn sciendaĵojn por la fakvortaristoj kaj terminologoj en Esperanto.

La 163 ĉapitroj kaj subĉapitroj de la manlibro traktas la jenajn ĉefajn temojn: 1) fakaj nomoj en la leksiko, 2) nocioj, 3) rilatoj inter nocioj, 4) terminoj, 5) kvin paŝoj al terminaro, 6) kreado de terminoj, 7) vortaroj kaj terminaroj, 8) internacia terminologia agado, 9) elekto de nova termino (la ekzemplo de *giso*), kaj 10) lingvistika minimumo. Sekvas indekso de terminologiaj terminoj (100 terminoj kun ekvivalentoj en la ĉeĥa, germana kaj angla), glosaro de novaj aŭ novsignife uzitaj terminoj, kaj 44-era bibliografio. Werner lerte kaj kreive uzis bazajn studojn el la faka nacilingva kaj Esperanta literaturo por kompili valoran gvidilon.

Necesas reagoj de multaj interesitoj por ellabori reviziitan duan eldonon. Ekzemple, estas erare distingi inter polisemio kaj plursignifeco; la materialon por ĉapitro 8 verkis ne Bednařík sed V. V. Akulenko; kaj trouzatas la fonemo *h* en komunuzaj vortoj jam longe kutime skribataj per *k* (*teĥniko*, *ŝĥemo*, *ĥemio*). Jen – nur kelkaj rimarkoj. La laboro de Jan Werner meritas grandan respekton kaj la seriozan atenton de lingvokonsciaj uzantoj de Esperanto.

Detlev Blanke (Germana DR)

Miksitaj sintenoj ĉe la lingvistoj

Oni avertis nin ke la etoso de "Les Etats Généraux des Langues" (Parlamento de Lingvoj) en Parizo, 26-29 aprilo, ne estos favora al Esperanto. Sed Unuiĝo Franca por Esperanto luis budon kaj invitis malsamlandanojn partopreni. Se oni decidus iri nur tien, kie la etoso estas favora, oni vizitus nur UK-ojn.

La malfermo okazis en la Granda Amfiteatro de la Sorbonne, antikva universitato de Parizo. Tie la etoso, helpe de multkoloraj kokteloj, estis amika; la prelegoj kaj rondaj tabloj de la sekvaj tagoj – ne tiel kuraĝigaj.

Kiel ekzemplo servu tre bone planita prelego de Profesoro Candlin (Macquarie University, Aŭstralio). Li insistis ke, je lingvo-instruado, komunikado ne plu estu la nura celo: gravas transformado, tutsanĝado de ideoj kaj sintenoj, interalie pri la gravaj problemoj de raso, aĝo, sekso, generacioj kaj povo. Post "rondaj tabloj" la ĉeestantoj rajtas interveni. Mi diris ke pri tiuj aferoj Esperanto antaŭlonge faris kaj faras interesajn proponojn. Lia respondo: Tute ne; se Esperanto iĝus internacia lingvo ĝi spertus precize la samajn problemojn kiel la aliaj lingvoj. Nenion plu. Ŝajne, la studentoj ŝanĝu siajn ideojn; la profesoroj, ne.

Aliflanke, prof. H. Weinrich brile parolis pri la "Diino Rapideco"; li diris ke la politikistoj malamas malsamecon, ĉar ĝi bremsas la grandan maŝinon de teknika civilizacio. Sed kulturo kiu pensas ekologie nepre subtenu diversecon, inkluzive lingvan. La angla lingvo disvastiĝas ne ĉar Ŝekspiro elstaras, sed ĉar Usono ŝatas unulingvecon. La anglan lingvon, kiu sufokas la aliajn lingvojn, oni devas instrui lastvice anstataŭ unuavice.

La plimulto de la prelegoj mezis inter tiuj vidpunktoj. Oftis la mesaĝo ke en la unuiĝinta Eŭropo ĉiuj civitanoj devos studi ne nur multajn lingvojn sed ankaŭ multajn kulturojn. Kaj oni diras ke ni esperantistoj estas utopianoj!

Bedaŭrinde, post iuj prelegoj eblis menciigi Esperanton nur al siaj najbaroj.

Unu kunvenon mi elektis ĉar devis estri ĝin Jos Nivette. Mi sciis ke kiam li estis prezidanto de AILA (Internacia Asocio por Aplika Lingvistiko) li aranĝis simpozion pri Esperanto, kadre de mondkongreso en 1984; en 1987, dum simpozio subtenata de Unesko, li diris ke oni devas instrui al studentoj unuavice ilian gepatran lingvon; due, ili elektu, por komunikado, inter "la germana, la angla, la francan, *aŭ, kiel ne, Esperanto?*" Poste, ili devas *kompreni* kiel eble plej multajn lingvojn kaj iliajn kulturojn. Nu, estas notinde ke Claude Piron, en sia ege utila broŝuro "Esperanto, l'image et la réalité", citas juĝon de Nivette en 1979 malfavore al tiu "artefarita lingvo". Sed ve, anstataŭanto estris la kunvenon, kaj kun bedaŭro anoncis ke antaŭ malpli ol unu semajno Jos Nivette forpasis. Li multe laŭdis la forpasinton, kaj petis silenton dum unu minuto por honori lian memoron. Kia ĉagreno senti ke rompi la silenton kun informoj pri tiu ŝanĝo de opinio malhelpus nian celon.

La etoso en la Esperanto-budo kompreneble estis korvarmiga. Kaj ankaŭ oni plezure aŭskultis kiam la elstara lingvisto, prof. Claude Hagège, dum festparolado je la Solena Fermo, favore kaj nemallonge menciis Zamenhof.

Maire Mullarney (Irlando)

SEMINARIOJ

Kien celu la eŭropa junularo?

La marta vetero ŝanĝiĝemis tiun tagon, kiam mi, preskaŭ novbakita aktivulo de TEJO, atingis la kastelon Grésillon akompanate de TEJO-prezidanto Jan Koszmaluk kaj sekretario Didi Weidmann. Kun kvardeko da homoj el dek landoj ni renkontiĝis dum kvin tagoj por diskuti la temon "Eŭrogeneracio": la perspektivoj por la junularo pro la sociaj kaj politikaj evoluoj en Eŭropo.

Jam la unuan vesperon la etoso vigliĝis, dank' al interkonatigaj ludoj kaj *Trivial Pursuit*, la mondfama ludo pri kono de bagatelaj informoj kaj detaloj kies Esperantan version ni ŝuldas al Eckhard Bick. Matene de la 25-a oni oficiale malfermis la seminarion. Reprezentanto de la subvencianta organizaĵo Eŭropa Junulara Fonduso, s-ino Philia Thalgott, enkonduke prelegis pri eŭropaj strukturoj kiel la Eŭropa Komunumo (12 landoj) kaj la Konsilio de Eŭropo (22 landoj), direktante nian atenton al tiu ĉi: institucio kies ĉefaj celoj rilatas homajn rajtojn, plibonigon de la vivnivelo en Eŭropo, interpopolan kompreniĝon, kaj la junularon. Post tiu enkonduko, kiu certe pli konsciigis nin pri la socipolitika medio en kiu ni vivas, sekvis pluraj prelegoj de esperantistoj.

Horst Gruner diskutige parolis pri antaŭjuĝoj, eksplikante sian tezon ke antaŭjuĝoj necesas por kompreniĝo kaj kunvivado, kaj fariĝas danĝeraj nur se ili ne adaptiĝas al la ŝanĝiĝanta realo. La sekva vigla debato montris kiom granda estas la intereso pri tiu temo, kiun pritraktos aŭtuna TEJO-seminario en Strasburgo.



Jurnalisto de la regiona televido de Angers intervjuas partoprenantojn de la seminario el Francio, Britio, Hungario kaj FR Germanio.

Rainier Heckhausen (FRG) dufoje prelegis pri "Junularo kaj Eŭropo", unue nemovade kaj poste el specife esperantista vidpunkto. Kiel la gejunuloj, kaj la esperantistoj, kunlaboru en la unuigo de Eŭropo; kiel rilate al la eŭropaj institucioj; kaj kien oni rigardu post 1992: ĉu al EK, ĉu al Konsilio de Eŭropo, ĉu al la tuta kontinento? Respondi al tiuj demandoj ne estas facile, kion ankaŭ pruvis la viglaj diskutoj post ambaŭ prelegoj. Debatiga estis ankaŭ la kontribuo de Francisco Javier Moleón,

Kial necesas Komisiito por Handikapitoj?

Antaŭ kelkaj jaroj la Estraro de UEA nomis min la Komisiito por Handikapitoj laŭ la rezolucio kaj propono de la Komitato. Ekde tiam mi klopodis kontakti kunlaboremulojn, sed ne venis tre kuraĝigaj reagoj. Unu fojon la redaktoro de *Esperanto* elfosis mian alvokon kaj aperigis en iu numero pri tiu ĉi temo. Intertempe *Voĉo de handikapuloj* de Internacia Asocio de Handikapitaj Esperantistoj (IAHE) ĉesis aperi. Restas preskaŭ silento pri esperantistaj handikapitoj. Mi provas ankoraŭfoje pritrakti la aferon kun espero ricevi pozitivajn reagojn.

Hodiaŭ, spite de elokventaj rezolucioj, efektive neniuj Esperanto-kongreso, kunveno, seminario, konferenco aŭ ekskurso estas partoprenebla de la handikapitoj.

Ĉu tio estas troigo? Kiel taŭga ekzemplo ni pensu pri niaj Universalaj Kongresoj. Ĉu la labordokumentoj estas sur sonbendoj por blinduloj? Ne! [Tamen la programo kaj aliaj materialoj ja estas. –red.] Ĉu gestolingva interpretado videblas por surduloj? Ne! Ĉu radseĝuloj povas eniri la ekskursobusojn, ĉiujn ĉambrojn (inkluzive de necesejoj ekipitaj per manreloj) de la kongresejo, hotelo kaj restoracioj? Ne! Ĉu fumado estas ĉie malpermesita por homoj kun sentemaj pulmoj? Ho ve, denove, ne!

Se la UK-oj estas tiaj, la malpli formalaj surlokaj aferoj estas eĉ pli malkuraĝigaj por handikapitoj. Konsentite, esperantistoj ne respondecas pri la nunaj mankoj de la busoj kaj hoteloj. Sed

la redaktoro de la Jarlibro de UEA, kiu komparis la labor- kaj vivkondiĉojn de sia devenlando (Hispanio) kun tiuj de la lando kie li nun laboras (Nederlando). El tiu komenca tre detala perspektivo evoluis tre interesa interŝanĝo de spertoj pri la sociaj sistemoj de pluraj eŭropaj landoj.

Kvin tagoj dum kiuj oni intense kleriĝis, informiĝis, komprenis, komparis kaj lernis, enhavis ankaŭ multajn aliajn intereseajn temojn. La Akademion Internacian de la Sciencoj San Marino (AIS) prezentis Martin Weichert (FRG), pri esperantista rokagentejo Eŭroka prelegis Floreal Martorell (Francio), kapitalismigon de Esperanto proponis la firmao "Interland". Sjoerd Bosga (Nederlando) priparolis la agadon de ILERA, la Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj, kaj pri telematiko prelegis Dario Besseghini (Italio). István Ertl (Hungario) montris tre interesan fenomenon en sia prezento de "Eŭropo en la Esperanta literaturo", nome ke la internacia vivo kaj plej ofte internaciaj amoj estas ties ĉefa temo. Vespere okazis ne nur babilado, ludado, dancado, sed ankaŭ altkvalita ĵazkoncerto ludata de amatora grupo el Parizo, kaj la 27-an Bruno Robineau kaj Maryvonne Rethorée (Francio) prezentis lumbildojn pri sia vojaĝo tra la mondo per Esperanto.

Eble iom maltro TEJO sin prezentis dum la seminario, kiu mem tamen atestis ke post longa krizo TEJO revigligiĝas. La prezidanto kaj ĝenerala sekretario pledis por pliaktiviĝo de tiuj, kiuj jam utiligas la servojn de TEJO, kaj por eklaboro de la "novuloj". Mi opinias ke al ĉiuj, kiuj vidas en Esperanto ion pli ol turismilon, TEJO povas provizi neanstataŭigeblan servon. Al tiuj homoj mi konsilas aktivi en TEJO, ĉar vere valoras la penon ke ĝi organizu ĉi tiajn seminarojn kaj ekzistu kiel kunligilo inter gejunuloj de la tuta mondo.

Alessandro Amerio (Italio)

aranĝantoj por esperantistaj aferoj havas la devon strebi kiel eble plej forte, cele al plena partopreno por ĉiuj homoj.

Kio estas la perdo pro la tradicia, proneglekta malbonvenigo al la handikapitoj? Membroj! Aĉetantoj de libroj! Abonantoj! Handikapitoj havas pli ol 500 milionojn da enloĝantoj. Tial ĝi estas merkato pli granda ol Usono aŭ Sovetunio. Kvankam multaj handikapitoj estas malriĉegaj (ofte pro la sensenca kaj maljusta rifuzo de nehandikapitoj dungi ilin), aliaj facile povus pagi laŭdezire.

Do, iu devas esti sprono, kontraŭ la forgesemo de esperantistoj pri la bezonoj de handikapitoj. Iu devas helpi varbi handikapitojn. Tiu "iu" ja estas la Komisiito por Handikapitoj.

R. Kent Jones

**Apartment D-6, 5048 North Marine Drive
Chicago, IL 60640, Usono**

KSM demandas: Kie la okcidentanoj?

En 1988 Koresponda Servo Mondskala superis la unuan fojon la limon de 1000 novaj aliĝintoj. Entute 1044 homoj el 51 landoj skribis al la komisiito, R. Llorens, serĉante alilandajn korespondantojn. Sed pri tiu unuavide impona cifero necesas fari du rimarkojn: temas ankoraŭ pri guto en oceano, kompare kun la nombro da homoj kiuj ĉiujare eklernas Esperanton kaj deziras uzi ĝin por korespondado; kaj nur nekonata ono de la aliĝintoj sukcesas starigi kontentigan korespondan rilaton pere de la Servo.

47% de la petoj venas el Pollando, 65% el Orienta Eŭropo, kaj praktike ĉiam tiuj homoj serĉas korespondanton en Okcidento. Absolute ne eblas respondi al ĉiu polo. Multaj petas Aŭstralion, dum nur 0,19% – du homoj – aliĝis el tiu mondoparto. La nombro de la afrikanoj multe malkreskis, ĉar tiuj ĉi ofte ne respondas, aŭ tuj petas sendon de varoj, mono ktp. Ili skribas unu-du leterojn, poste nenion. Ofte okazas problemoj kun irananoj, multaj el kiuj ege malbone scipovas la lingvon; kelkaj skribas en la angla lingvo, kiun mi ne regas kaj por kiu mi rifuzas deĵori. Krome ne sufiĉas ke iu iranano deziras korespondi kun iu en difinita lando, sed devas esti iu tia landano kiu akceptas irananon. Ne multaj petas irananon korespondanton.

Certe la propagando por KSM devus esti pli vasta kaj ni devus elspezi por tiu celo. La Esperanta gazetaro ne tre atentis KSM-on. Mi konstatis ke en 1988 en *Esperanto* aperis nur unufoje resumo de mia artikolo, kiu aperis komplete en *Heroldo*. Estis bona financa situacio en 1988 dank' al la malavareco de kelkaj gesamideanoj, kaj la helpo de s-ro Hasala en Ĉeĥoslovakio denove permesis ŝpari pli ol 300 FF. Dank' al la multobligilo de UEA mi multe ŝparos, sed aliflanke KSM devas aĉeti pli potencon komputilon por pritrakti la pli grandan nombron da aliĝantoj – kvaroblo de tiu antaŭ mia deĵoro.

R. Llorens

Detaloj pri KSM, inkluzive de modela aliĝilo, aperas sur p. 113-14 de la nova Jarlibro. Ni aparte petas la okcidentajn E-revuojn atentigi siajn legantojn pri la ekzisto kaj regularo de KSM laŭ tiu priskribo, inkluzive de la uzo de internaciaj respond-kuponoj.

S-ro Llorens volonte dividus la prizorgon de ĉi tiu grava servo, cele al pludono al alia kompetentulo. Se vi interesiĝus fariĝi kunlaboranto, eventuale gvidanto de KSM, bonvolu anonci vin al la CO en Roterdamo. La supra jarraporto indikas la kvalitojn bezonatajn.

Mil kaj unu . . . ĉu ne fabela nombro? Verŝajne multe pli ol mil kaj unu (malfruaj) noktoj kunteksis la redaktoran rakonton de la pasintaj okdek kvar jaroj. Pri nur ono de ili povas nun paroli la roluloj mem. Jen tio, kio eblis – kaj al via fantazio, provizore, ni lasas la tempnebulajn noktojn de Hodler, Privat kaj ilia kolegaro. Al ili iros la vico iam poste.

Akuŝanto de la nova epoko

Mi venis sur la redaktoran seĝon de *Revuo Esperanto Internacia* je la fino de 1954, kiam kulminis la herakla laboro de Lapenna ĉe Unesko. Mi notis:

Inter la streĉoj akraj kaj senintermitaj, nia reprezentanto ĉe UNESKO, Profesoro D-ro Lapenna, ĵetis al mi unu post alia senspirajn informetojn pri la lukto en Montevideo kontraŭ situacio malfavora kaj ŝtoniĝinta kontraŭ nia lingvo kaj afero.



La unua poŝtkarto portis la daton 30-a de novembro:

“Estas absolute neeble skribi iom pli longe. Jen ĉefajoj: (1) Ekspozicio grandega sukceso – (2) UEA ricevis konsultan pozicion la 25-an – (3) Rilate la Peticion la situacio estas absolute senespera. La sola eta, eta espereteto estas la parolado, kiun mi intencas fari...”

Sekvis la interveno de la malklera farsulo Blinkenberg, kiu eniris en la Esperantan folkloron kaj preskaŭ en PIV-on, kaj la obstina lukto, kiu elŝiris la standardon el la manoj de la opozicio. Prezidanto Malmgren prave skribis: “Ne vane D-ro Lapenna mobilizis ĉiujn siajn fortojn por skermi ĝis la plejlasta momento de la batalo.”

Tiujare (1955) sur la paĝoj de la organo aperis kontribuoj de Baghy kaj Kalocsay, Juan Régulo, Waringhien, Jean Forge, Auld, Privat, Paul Nylén, Dondi, Kořínek, Poul Thorsen, kaj Ribillard per felietona presado de *Vagado sub palmoj*.

Mi amuziĝis desegnante vinjetojn por la rubrikaj, kaj atingis koncizigon de ofte pufaj raportoj el la Esperanta mondo per duobla taktiko. Unue mi reduktis la tekstojn kaj poste la edzino, ne vidinte la originalojn, prenis la resumojn kaj reduktis ilin pli.

En la juli-aŭgusta numero mi uzis por kovrila bildo la foton de du brazilaj belulinoj, la “Reĝino kaj Princino de Esperanto” kaj ricevis indignajn riproĉojn pro mia frivoleco neinda je tiel grava organo.

Mi ankaŭ konstatas, ke la “Belarta Konkurso” havis ankoraŭ la logikan singularon, ĉar temas pri unu ĉiujara evento (la Konkurso) kun diversaj branĉoj, kiel la kimra *ejstedvodo* (kulturfesto) kiu ĝin inspiris.

Mi finas per unu spritaĵo el la kajeroj. “*Aŭdite*. Amiko al eldonisto Juan Régulo: ‘Ĉu vi aŭdis, ke la Aŭstria Esperanto-Federacio ekskomunikis la poemlibron *Kvaropo*?’ Juan Régulo: “Nun se mi havus mil ekzemplerojn mi rapide vendus ilin.”

Reto Rossetti

Sufiĉe abunde da literaturo

La 5-an de novembro 1955 UEA fermis sian oficejon en Heronsgate (Anglujo) kaj transportigis sian ilaron al Roterdamo, kie malfermiĝis oficejo de UEA je la 15-a de novembro. Temis pri la komenciĝo de “nova epoko” por la movado sub gvidado de Ivo Lapenna, la heroo de Montevideo. Mi estis unu el la kvaropo – Lapenna, Vermaas, Fighiera (Gian-Carlo) kaj Auld –



kiu iris al Heronsgate por finaranĝi la translokiĝon. Nin aliajn Lapenna taksis lia “baza teamo” por la novaj klopodoj: Vermaas kiel direktoro de la CO, Fighiera kiel KKS, Auld kiel redaktoro de la revuo.

Ĝis tiam mi estis redaktoro de *Esperanto en Skotlando*, kaj la transiro al la revuo *Esperanto* ŝajnis al mi speco de “promocio”! La unua numero redaktita de mi estis la numero de novembro 1955, la antaŭlasta el tiuj, kiujn ni presigis en Anglujo. Sur la kovrilo de la decembra numero vidiĝas foto de mi, Lapenna, kaj la antaŭa provizora redaktoro Reto Rossetti, super la demando: “Kiamaniere la revuo plej efike servu la bezonojn de la movado?”

Lapenna deziris havi revuon grandformatan kaj imponan; li eĉ diris, ke mi prenu kiel modelon la revuon *La suda stelo*, kiun li mem siatempe redaktis. Tion mi iel-tiel faris. Vermaas trovis por ni novan presiston en Roterdamo, junan viron, kun kiu mi sukcesis starigi tre amikajn rilatojn. De artista amiko mi mendis kovrildeseĝon, kiu estis vere tre bela; bedaŭrinde (ĉar neniu atentigis lin) la presisto presis ĝin nigre sur flava fono – kaj nigra kvinpinta stelo sur flava estis, minimume dirite, neoportuna en iuj landoj. Ni tamen retenis la deseĝon (nur la aprila numero aperis verde presita) ĝis la jarfino, sed ni starigis konkurson kun malgranda monpremio por pli taŭga kovrildeseĝaĵo.

La konkurson partoprenis 10 artistoj per 17 projektoj, kaj juĝa komisiono elektis projekton de s-ro Milton (Britujo) iomete modifitan de s-ro Calado (Nederlando). Nun eblas konfesi, ke s-ro Milton estis mi mem (la komisiono tion ne sciis, kompreneble), kaj tiun kovrilon ni uzis dum pluraj jaroj. Tiutempe mi sufiĉe ofte desegnis ilustraĵojn por la revuo; fakte, mi ĵus rimarkis unu sur p. 6, jan. 1957, kiu ankoraŭ plaĉas al mi!

Pro mia konata temperamento, la revuo tiutempe enhavis sufiĉe abunde da literaturo, inkluzive de multaj valoraj. La Estraro decidis, ke valorus aperigi beletran/belartan suplementon al la revuo, kaj la unua el du jaraj suplementoj aperis en aprilo 1958. Bedaŭrinde, post la tiujara junia numero mi fariĝis iom grave malsana kaj devis rezigni pri la redaktado. Transprenis la laboron Kirsten Zacho.

En decembro 1960 mi reprenis la redaktadon kaj restis redaktoro ĝis la fino de 1962, kiam laŭ invito de la Estraro mi fariĝis redaktoro de nova literatura revuo eldonota de UEA, *Monda kulturo*, kaj Victor Sadler iĝis redaktoro de la revuo. Tiel finiĝis mia aktiva ligiĝo al nia oficiala revuo, sed mi restas ĝis hodiaŭ eble ĝia plej fervora kaj entuziasma leganto! Dankon al miaj posteuloj!

William Auld

Ankaŭ mi trovas stranga, ke iu, kiu dum multaj jaroj redaktis ĉi tiujn paĝojn, havas nun nenion por diri pri tio. Pardonu min la legantoj. Mia memoro restas fermita.

Victor Sadler

Ĉiam strebe al tutmondeco

Kiam mi redaktis la revuon *Esperanto*, inter 1970 kaj 1973, estis super mi Victor Sadler kiel la ĉefredaktoro. Ĉar li estis samtempe la direktoro de la Oficejo, li lasis al mi multon de la redakta laboro.

Tamen mi devis okupiĝi ankaŭ teknike pri la redaktado de la Jarlibro, *La praktiko* kaj *La monda lingvo-problemo*, kaj pri iom da korespondado. Fakte ne estis facile redakti eĉ unu monatan revuon, ne disponante 10-12 horojn tage, ĉar la redaktistaro tiam devis fari ĉion. Ne estis aliaj oficistoj, kiuj sub la redaktistoj laboris.

Por mi unu el la plezuraj flankoj de la laboro estis la grafika aranĝo, ekzemple ekspluati la kovrilan koloron ankaŭ sur la internaj paĝoj sen ekstra kosto. Problemo estis, ke ne ĉiam restis ĉe niaj manoj bonaj fotoj kaj bildoj.

Ĉiuj manuskriptoj kompostitaj por la revuo estis fotokopie



Premsonĝoj pri pezaj jaroj

Ĉu la revuo *Esperanto* kaŭzas al vi premsonĝojn? Kia demando! Kelkaj artikoloj eble oscedigas, kelkaj eĉ sonĝigas (pri la fina venko), sed premsonĝojn ili ja apenaŭ povus kaŭzi.

Tamen, kiom ajn nekredebla tio povas ŝajni, ĉi tiu numero de ĉi tiu revuo jam kaŭzis premsonĝon – pli precize, ĝuste ĉi tiu eta skribaĵo tion kaŭzis. Komence, mi pardonpete rifuzis la redaktoran inviton kontribui. Poste, mi tamen cedis duonpromeson al telefona premo el la Centra Oficejo. Kaj la pasintan nokton mi sonĝis: Oni devigis min stari antaŭ publiko kaj fari paroladon, sed mi trovis tute nenion por diri. Streĉa, malagrabla sonĝo . . .

Kial? Oni petis min rememori pri miaj jaroj kiel redaktoro. Ne eblas fari tion sen revivigi mense la vivon de grafikisto, kongresorganizanto, direktoro, kontisto . . . revivi pezajn jarojn de laboro malsane streĉa kaj multhora.

Jam de ses plenaj jaroj mi forestas de la centro de UEA. Sed ĝis hodiaŭ ankoraŭ, en ĉiuj premsonĝoj mi trovas min denove en tiu medio: antaŭ la inaŭguro de kongreso (kaj perdinta la dokumentojn), pagonta la hotelojn (sed sen la ĝusta valuto), maltrafonta aviadilon, perdinta la pasporton . . . la cikatroj restas en la spirito.

sendataj al la tiama prezidanto de UEA (Ivo Lapenna). Normale li ne reagis pri tiu aŭ alia artikolo. Kiel redaktoro mi dufoje rifuzis manuskriptojn de la prezidanto. Unufoje la teksto, kiu ne portis lian subskribon, tamen aperis post forigo de kelkaj linioj. La alia malakcepto temis pri ĉ. 5-paĝa refuta artikolo. En ambaŭ kazoj mi estis preta akcepti eventualan maldungon.

Redaktante, oni ofte renkontas novajn vortojn en manuskriptoj. Eĉ se ili troviĝas en Plena Ilustrita Vortaro, PIV-on posedas nur limigita nombro da esperantistoj. La konscienco riproĉis pro allaso de tiuj vortoj. Simile, kiam mi eklaboris en la Centra Oficejo, mi decidis agi kaj pensi supernaciece. Estis speco de tabuo paroli kaj presi en la revuo pri sezonoj. Ankaŭ pri religioj: se la kristanisma *pasko* aperas en la revuo, kial ne la budhisma *urabono*? Kun mia supernaciismo ne kongruis la uzo de la kristana jaro en la revuo de UEA. Kiel trakti la islaman jaron aŭ aliajn jarojn de aliaj landoj? Bolis mia justosento, sed mankis alternativo.

Por egale trakti la diversajn naciojn de nia membraro (tiam naŭ dekoj da landoj), mi eĉ iom tro ekstreme agis. Dum la Universalaj Kongresoj, kiujn mi ĉeestis kiel redaktisto, mi evitis paroli kun japanaj kongresanoj por ne impresi, ke mi iel favorus la japanan popolon antaŭ la tutmonda membraro.

Nagata Akiko

Ĝi estis mi, mi estis ĝi

Gimnaziano revis iĝi ĵurnalisto. Li volis vojaĝi. Konkeri la mondon. Studento gustumis la raportistan metion en granda radiostacio. Samtempe venis konatiĝo kun Esperanto. La fora 1956 tio estis. En 1960 mi eklegis ĉi tiun revuon. Ene de mi naskiĝis eta persona komploto: "Ĉi tagon mi volas redakti tiun revuon tie en Roterdamo." Kiam Sadler kaj Lapenna proponis al mi meze de 1973 direktoriĝi en la CO, mi rifuzis. "Mi volas redakti la revuon," mi diris. Ne helpis sesioj de konvinkado en Roterdamo kaj Londono. Mi insistis. Tio devigis Sadler retiri sian duan demision kaj gvidi la Oficejon pliajn dek jarojn. Mi ekredaktis en januaro 1974, sed oficiale redaktoriĝis en majo samjare. Mia lasta numero estis tiu de majo 1984.

Kun iom da numeroj gastredaktitaj, el la jubilea milo mi estas proksimume 125 numeroj de ĉi tiu revuo. Mi ne hazarde diras "mi estas" tiuj 12,5% de la longa revua vivo. Kiel redaktoro, mi plene identiĝis kun la revuo. Ĝi estis mi, mi estis ĝi. Tra la jaroj, mi parkeris ĉiun vorton en kiu ajn revunumero, sentis min respondeca pri ĉiu komo en ĝi.


En la komenco estis malfacile. Ne pro spertomanko, eĉ movada (*La suda stelo*, *Kontakto*). Redakti ĉiam signifis por mi plene regi. Mi volis regi en la revuo, kiun mi redaktas. La tiama Estraro ne samopiniis. Venis baldaŭ konfliktoj. Mi asertis, ke la

abonon je unu eventuale ĝoja tago jare, se la spezokonto montras pozitivan saldon. Mi lernis multege redaktante. De multaj, eble pleje de tiu fascina kaj nun laca Sadler. De Lapenna, de Tonkin, Waringhien, Auld, Régulo . . . Lins, kun kiu mi amikas tridek jarojn, estis mia alia konscienco. Li estis la unua leganto/aŭskultanto de ĉiuj miaj aŭdacaj/dubaj tekstoj.

La lingva nivelo estis unu el miaj redaktoraj obsedoj. Eble mi eĉ atingis iom da pretendoj sur tiu kampo, konscia ke ĉi tiu revuo influas la evoluon de Esperanto pli vaste kaj pli efike ol la Akademio. Mia politiko rilate la revuan lingvouzon estis simpla: respekti la Fundamenton sen resti surda por la aktualaj uzo kaj evoluo. Ĉi tiu revuo ne rajtas eksperimenti lingve.

La stilo estis alia pretendo. Sinkopaj frazoj, iom da petolo kaj intimo (ne nur en "Vi trovos") celis definitive disbati la protokolecan tradicion en la revuo. La internacieco (monda, ne eŭropa) estis plej malfacile atingebla. Ne lingve sed informe. Jam en mia unua numero la artikoloj-bomboj temis pri Ĉinio kaj araba lingvopolitiko. Mi strebis en ĉiu numero havi almenaŭ unu tian artikolon-bombon, lanĉitan por eksplodi, por movi, por atenci letargion kaj inerton, por sproni kaj agigi. Freŝeco de informoj havis ĉiujn prioritatojn. Mi ne ĝeniĝis refari plurajn paĝojn nokte, por krei lokon al io grava okazinta hieraŭ.

Bonaj konantoj de mia redakta stilo jam delonge etikedis min "perfektisto". Tio ne estas malvera sed jes malĝusta. Mi konsentus esti nomita "malfuŝisto", ĉar mi neniam konsentis



revuo ne estas afiŝtabulo de la Estraro. Mi volis igi ĝin revuo de la membraro de UEA. Nova kaj senkulpa, ne ŝargita de oniaj spertoj kaj konfliktoj, mi ne volis akcepti alies "nigrajn listojn". Jam en junio 1974 oni cirkuleris pri mia "eksiĝo". Mi ne vere ekŝiĝis, mi nur aŭdacis malakcepti truditan tekston, kion la redaktoro tiam ne rajtis fari laŭ estrara decido. Kiam baldaŭ poste elektiĝis nova Estraro kaj volis ree nomi min redaktoro, mi postulis ke oni unue nuligu tiun decidon, kiu limigis la redaktorajn rajtojn.

Multajn jarojn poste, en estrara kunsido mi plenlaŭte diris al la prezidanto de la Asocio: "Vi havas facilan vivon. Vi interpretas la politikon de UEA unufoje jare, en festparolado kongresa. Mi festparolas 11-foje jare sur po 24 paĝoj." Mi ankaŭ nun opinias, ke redakti ĉi tiun revuon estas la plej respondeca kaj la plej peza laboro en la Esperanto-movado.

Sadler, apude, tre trafe bildigas la pezon de tiu tasko. Mi ne plu havas premsonĝojn pri la revuo, kiel li. Mi bezonis jarojn por ankaŭ mense divorci de mia iama revuo. Mi gaje reripensas tiujn redaktorajn jarojn. Mi tiam havis abonon je almenaŭ unu ĝoja tago monate: La revuo venas de la presisto. Ĝi estas mi, resumo de miaj zorgoj, streboj, (mal)kapabloj. Nun mi havas

cedi la kvaliton. La revuo ofte malfruis, ĉar mi rifuzis kompreni ke ĝiaj ricevantoj abonas 24 paĝojn da akurate liverata papero. Mi insistis, ke ili atendas 24 paĝojn da bone redaktitaj tekstoj kaj aktualaj, fidindaj informoj.

Kvankam unu el la plej longe servintaj redaktoroj, mi neniam produktis numeron, kiu plene kontentigu ankaŭ min. Ĉu triste? Ne vere, ĉar tio malhelpis rutiniĝi, ekdormi. La maldormo estas unu el la ĉefaj trajtoj de bona redaktado. Tamen, pri mia plej malfacila numero (septembro 1974) mi ankoraŭ fieras. Necesis tiam en kelkaj semajnoj kompreni tion por kies findigesto la movado bezonis pli ol tutan postan jardekon.

Iom da miaj tekstoj, subskribitaj kaj "senaŭtoraj", kiuj estas preskaŭ tute laŭ mia "perfektista" gusto, disŝutiĝis tra tiuj 125 numeroj. Kiam mi pensiiĝos, mi faros el ili mian "idealan" numeron. Ĝi ne estas abonebla. Ĝi ne aperos. Ĝi ja ekzistos kiel intima, privata omaĝo al la plej postula kaj plej ama tasko de mia eta vivo. Ĉi tagon mi volis redakti tiun revuon tie en Roterdamo. Ĝi helpis al mi konkeri la mondon. Ne eblas nun elnombri miajn geamikojn sur la terglobo. Ili plimultas ol la paĝoj en miaj 125 revunumeroj.

Simo Milojević

Virinoj kiel agantoj kaj viktimoj

Sanga nupto kaj La domo de Bernarda Alba. Federico García Lorca (1899-1936). El la hispana trad. Miguel Fernández. Madrid: Ediciones La Misma, 1987. 229p. 21cm. Serio Oriento-Okcidento de UEA 23. 22,80 gld.

Federico García Lorca estis mortigita fare de bando de ribeluloj je la komenco de la hispana interna milito, kiam li estis nur 37-jara. Dum tiu mallonga vivo li verkis, krom grandan kvanton de poemoj, 13 dramojn. En ĉi tiu libro ni trovas du el ili: la tragediojn *Sanga nupto* kaj *La domo de Bernarda Alba*. La unue menciita debutis en Madrido la 8-an de marto 1933. Ĝi estas bazita sur reala evento kiu okazis en vilaĝo ne malproksima de Granada, kiu devis impresi la aŭtoron sufiĉe por krei el mallonga ĵurnala raporto ĉi tiun tragedion. La poeto Jorge Guillén, amiko de Federico, diris kiel la ideo kaj skizo pri *Sanga nupto* estis kovitaj en la menso de Lorca dum, eble, kvin jaroj, kaj poste estis pretigitaj en monatoj por la teatro.

La dramo sekvas, ĝis certa grado, la skemon de greka tragedio, kie ĥoro informas nin pri tio kion ni vidos. García Lorca faras same per voĉoj de flankaj rolantoj, kiuj verse faras aludojn kaj mencias simbolojn, pretige al la eventoj kiuj okazos sur la scenejo. El la rolantoj nur unu, Leonardo, ricevas nomon, tiamaniere avertante nin ke ni devas observi lin; "Servistino" ankaŭ atentigas nin pri ebla misago lia dirante:

*Antaŭ longe alvenis Leonardo kun sia edzino,
alkurinte kiel demonoj. Ŝi aperis morta de timo.*

Lorca ofte montras ambivalencon en virinoj, kiel ni vidas en la tria akto inter Leonardo kaj "Spozino":

*L: Jam faris ni l'faron; ĉesu!
Persekutantar' tuj venos,
kaj mi vin kunprenu ien.
S: Sed nur perforte mi cedos!*

Tamen la dialogo kiu sekvas montras ke ŝi ne nur forkuris libervole sed ankaŭ pretigis la ĉevalon de Leonardo por la fuĝo. Denove en la lasta sceno montriĝas ŝia ambivalenco inter "Spozino" kaj Leonardo. Sed mi ne intencas klarigi la intrigon. *Sanga nupto* estas verko sen vorto superflua kaj efike verkita. Mi opinias ke ĉi tiu tragedio, en manoj de kompetenta komponisto, povintus fariĝi la hispana *Cavalleria Rusticana*.

La dua dramo en la libro, *La domo de Bernarda Alba*, estas same bazita sur reala okazintaĵo; sed Lorca tiel malbone kaŝis (ĉu intence aŭ ne, ni ne scias) la identecon de la originala Bernarda, ke en novembro 1985 parencoj de la vera virino intencis procesi kontraŭ la heredintoj de Lorca (vidu noton en paĝo 224 de la libro). La tragedio estis verkita dum 1935 kaj 1936, kaj la 13-an de julio 1936 Federico legis en la domo de la poeto Dámaso Alonso, antaŭ amikoj, partojn de la verko. La hispana milito eksplodis la 18-an de julio, kaj *La domo de Bernarda Alba* ne debutis ĝis 18 jarojn poste.

En la titola domo loĝas Bernarda kun siaj kvin filinoj. La plej aĝa,

Angustias, estas fianĉino de Pepe la Romano, kaj estas li kiu kreas la konflikton inter la fratinoj kaj portas nin al la fina tragedio. La rigora disciplino de la patrino permesas nur al Angustias paroli kun Pepe tra krado de la fenestro, dum la aliaj kverelas kaj intrigas pro frustracio kaj ĵaluzo. La dramo estas nur por aktorinoj, ĉar Pepe ni neniam vidas. Pro ĝia longe prokrastita surscenejigo, mankas en ĝi tiuj atento-frapoj kiujn ni trovas en la aliaj dramoj de Lorca: la fama aktorino Margarita Xirgu ofte konsilis al li dum la provoj pri ŝanĝetoj por doni pli efikan frapon al la spektantoj. *La domo de Bernarda Alba* estas la verko de Lorca plej ofte prezentata en tradukoj, eble ĉar ne estas en ĝi tiom da simboloj malfacile kompreneblaj por ne-hispanoj.

Miguel Fernández meritas gratulon pro la fidela traduko de ambaŭ dramoj kaj la mirinda maniero per kiu li konservas la karakteron de la originalo. En la libro ankaŭ abundas notoj kaj klarigoj kiuj helpas – eĉ al hispanoj – por pli bone kompreni la plurajn aludojn kaj simbolojn en la verkoj.

Amador Díaz (Britio)

Liberala kaj dinamisma kulturo prezentigas al la mondo

Aŭstralia antologio. Red. Alan Towsey. Pisa: Edistudio, 1988. 431p. 21cm. Bind. Serio Oriento-Okcidento de UEA 24. Prezo: 75,00 gld.

El la antaŭparolo de Humphrey Tonkin ni ekscias, ke la unua nacia literatura antologio en Esperanto estis tiu de Kabe (K. Bein) de la pola literaturo en 1906. En la moderna periodo, vico da tiaj antologioj helpis konfirmi la kulturan valoron de nia lingvo kaj permesi al internacia legantaro ĵeti senperan rigardon en la mondliteraturon. Specialan valoron havas, laŭ mi, la jam aperintaj antologioj de la ĉina, japana kaj hungara literaturoj, pro la nekonateco de tiuj nehindeŭropaj lingvoj.

La aŭstralia literaturo estas malfacile klasifikebla. En la koloniaj tempoj oni povis konsideri ĝin parto de la angla literaturo, sed dum la 200 jaroj kiuj sekvis, la aŭstraliaj lingvaĵoj kaj elparolo alprenis multajn distingajn trajtojn, simile al la dife-

La aŭstralia literaturo, kiel ĝia pentroarto, ofte trovas inspiron en la vastaj sovaĝaj spacoj.



Pentraĵo: T. Penleigh Boyd

renco inter la lingvoj de Usono kaj Anglio. Ankaŭ la mond-percepto de la aŭstraliaj aŭtoroj alprenis specialan karakteron, precipe post la dua mondmilito kiam oni kuraĝigis enmigradon, unuavice el Eŭropo. Tiu ĉi nova literaturo estas nek eŭropa nek pacifika. Ĝi glitas tra la reto de la tradicia klasifikado kaj inkludas ankaŭ la kontribuon de la indiĝenoj. Estas do tute ĝuste, ke oni aperigis la libron en la serio Oriento-Okcidento, kvankam oni povus ĝin konsideri eĉ pli bone por serio Nordo-Sudo, se ĝi ekzistis.

Inter la kunlaborintoj kaj tradukintoj troviĝas ne nur emerita ambasadoro Ralph Harry, sed ankaŭ Fay Koppel, Trevor Steel kaj la tuta kremo de la aŭstralia esperantistaro, kaj krome famaj eksteruloj kiel William Auld, Marjorie Boulton kaj aliaj. La elekto de la enhavo celas "la mezkleran ne-aŭstralian esperantiston". Tiel oni povas legi ĉerpaĵojn unuflanke de la literatura elito, ekzemple Nobel-premiito Patrick White, influaj poetoj R. D. Fitzgerald kaj Judith Wright, sed aliflanke de vaste popularaj aŭtoroj kiel Miles Franklin (*Mia brila kariero*), Thomas Keneally, Morris West, kaj popolaj kantoj kiel la internacie konata "Vals' kun Matilda". Menciindas la zorgaj enkondukaj notoj kiuj prezentas la fonon al la diversaj aŭtoroj kaj pecoj.

Eraroj kaj anglismoj enestas en modera kvanto. Ĝenis min la ofta uzo de la karesaj derivaĵoj -ĉjo kaj -njo, ekz. en la apenaŭ elparoleblaj *Dabĉjo*, *Jakĉjo* kaj eĉ *Viĉjo*, kiuj donas slavan pli ol anglosaksan impreson. Tamen ĉi tiu bele presita kaj fortike bindita libro okupas specialan lokon en la Esperanta literaturo. Oni legos ĝin tra la mondo kun la intereso kiun meritas la nova liberala kulturo kaj dinamike kreskanta civilizacio de Aŭstralio, kiuj kunfandas la kontribuojn de multaj popoloj.

Jozefo Major (Novzelando)

Pli aktuala ol iam ajn

Laŭdo de l' Stulteco (1511). Erasmo de Roterdamo (1469?-1536), el la latina trad. Gerrit Berveling. Enkondukoj de H. Tonkin kaj A. Goodheir. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1988. 112p. 21cm. Ilus. de Hans Holbein la Juna (1497-1543). Serio Oriento-Okcidento 25. Prezo: 30,00 gld.

Verko, kiu duonjarmilon aperas ĉiam same freŝa kaj aktuala, estas pli ol brila, *Laŭdo de l' Stulteco* eĉ multe pli: tiu ĉi freneza jarcento, en kiu "la tempoj grandas kaj la homoj etas" (Kalocsay), horore faris ĝin eĉ pli aktuala.

UEA ne estus povinta elekti pli taŭgan verkon por saluti la kongresanojn de la roterdama UK ol tiun ĉi. Ja Erasmo estas la plej granda filo de Roterdamo, sed antaŭ ĉio li estas la plej elstara figuro en la tuta historio de humanismo kaj ĝuste tial ni esperantistoj devas lin koni. Verŝajne multaj el ni eĉ laŭnome ne konis lin, ĉar kiel diras Goodheir: "Li metis fundamenton de edukado por jarcentoj, sed li faris sian taskon tiel bone, ke oni povis forgesi pri li." Sed tiu ĉi verko, "lia plej genia . . . ankoraŭ vivas kaj postulas tradukojn."

Laŭdo de l' Stulteco estas majstroverko de ironio kaj parodio, moko kaj kompatato. Homan vanton kaj memamon apenaŭ eblas draŝi samtempe tiel funde-detruite kaj kun tia humurpleno kaj stila deliro kiel ĉi-libre okazas. Sed la stulteco, kiun Erasmo dismuelas, ne estas nur niaj vantaĵoj. El ili kreskas io multe pli danĝera: aroganteco kaj perforta trakto de vero kaj pravo. Kiel facile estas trovi pruvojn en nia propra tempo al lia denunco pri teologoj, kiuj "ĉie elprenas kvar aŭ kvin vortojn kaj, se necese, eĉ tordante, ili akomodas tiujn por sia celo, eĉ se kio antaŭas kaj kio sekvas neniamaniere rilatas al la afero, aŭ eĉ rekte kontraŭas al ĝi." Per ĉi-speca kritiko Erasmo preparis vojon por la Reformacio, al kiu li tamen ne aliĝis; eĉ male, li venis en konflikton kun Luther pro ties ekscesoj.

La koncepto de stulteco tamen estas tre kompleksa. Ne temas nur pri kondamno de io efektive stulta kaj malsaĝa, eĉ se prezentata saĝa kaj racia. Same tiel ŝajna stulteco fine estas saĝeco kaj la plej alta saĝeco evidente estas kredo je Dio, ĉar en tiu "frenezaĵo" eblas ete antaŭgustumi futuran feliĉon. (Kiam mi, ŝaŭma junulo, legis Erasmon en la suoma, mi perfortis el li ateiston pro tiu komparo de kredo kun frenezo. Efektive, stulteco tre prosperas en junaĝo, kiel diras nia majstro.) En nia ĉiutago stulteco estas ankaŭ kompatema, eĉ ne eblas vivi, se ni antaŭscius ĉion, kio nin atendas.

Esperantistoj povas en tiu ĉi verko legi ne nur humanisman pledon por veramo kaj toleremo, sed ion pli: eĉ se ni ne estus "stultaj pro Dio", ni ja estas stultaj pro Esperanto. Saĝuloj lernas la anglan, dum ni restas ĉe nia stultaĵo. Ja ĉiam la plej saĝaj estis la plej stultaj.



Desegnaĵo: Gilian Goodheir

Erasmo certe ne enuis kiam li verkis sian libron, kaj certe ankaŭ Gerrit Berveling ne enuis kiam li ĝin tradukis: eĉ se mi ne kapablas konfronti la Esperantan tekston kun la latina originalo, mi ja spertas kiel virtuoza estas ĝia stilo. Ĝi nete venkas la suoman. Tiu eminenta rezulto certe ne devenas nur de la kompetenteco de Berveling kiel latinisto kaj verkisto. Oni trasentas, ke ankaŭ spirite li estas erasmano. Vere gratulinda traduko!

Abundaj notoj kaj klarigoj helpas al detala kompreno de la enhavo, sed mi konsilas neglekti ilin ĉe la unua lego por senĝene ĝui la stilon. Ankaŭ tiel oni kaptas la mesaĝon de la verko, precipe se oni komencas per la prilumaj antaŭparoloj de Tonkin kaj Goodheir. Plian ĉarmon donas la desegnaĵoj de Hans Holbein la Juna.

Nur unu aferon mi fine bedaŭris: nemencion de H. J. Bulthuis, kiu la unua tradukis tiun ĉi verkon. Sendube lia esperantigo, kies bela manskribaĵo kuŝas en Biblioteko Hodler, paliĝas apud tiu de Berveling. Oni tamen sciu, ke kiam la mondo vere frenezigiĝis en formo de la dua mondmilito, la reago de Bulthuis estis ektraduki Erasmon kiel unu el siaj lastaj faroj.

Osmo Buller (Finnlando)

Laste aperis...

Atlaso de insekta morfologio. Esperanta-latina-ĉina. Latina originalo de H. Steinmann kaj L. Zombori. El la latina en la ĉinan kaj Esperanton trad. Li Kexi. Beijing: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1987. 454p. ISBN 7-5052-0000-3. 20cm. Bind. Detale ilustrita trilingva terminaro. 31,20 gld.

Ĉina Esperanta vortaro por scienco-tekniko. Beijing: Pekina Esperanto-Asocio, 1988. 499p. 18cm. Unudirekta vortopara terminaro. 21,00 gld.

Dokumentoj kaj materialoj. La 19-a tutsovetia konferenco de KPSU. Raporto, elpaŝo kaj parolo de Ĝenerala Sekretario de CK KPSU Miĥail Gorbaĉov. El la rusa trad. L. Novikova k.a. Moskvo: APN, 1988. 142p. 19cm. 6,00 gld.

Estona-Esperanta-rusa naturprotekta vortaro. Eesti-Esperanto-Vene looduskaitse sõnastik. Komp. J. Eilart, F. Eisen. Red. J. Ojalo. Tallin: Izvestija Estonskogo Obŝĉestva Okhrany Prirody, 1985. 13p. 28cm. 168 terminoj. 3,00 gld.

Fantoma edzino, La (ĉ. 1930). Eduard S. Payson. Vieno: Pro Esperanto, 1988. 20p. 21cm. Lingve klasika rakonto pri stranga okazaĵo en usona montaro. 6,60 gld.

Gvidlibro pri Liaoning-provinco. Shenyang: Liaoning-Belarta Eldonejo, 1986. 44p. 19cm. Kolorilus. 3,00 gld.

Konciza Esperanta-ĉina vortaro por scienco-teknikoj. Beijing:

Pekina Esperanto-Asocio, 1985. 321p. 18cm. Unudirekta vortopara terminaro. 15,00 gld.

Konciza gramatiko de Esperanto. Beijing: Pekina Esperanto-Asocio, 1987. 122p. ISBN 7-5382-0353-2. 18cm. Por ĉinlingvanoj. 5,10 gld.

Kratkij samouĉitelj esperanto. V. G. Gakalenko. La aŭtoro, 1988 (loko ne indikita). 46p. 21cm. Ruslingva lernolibreto. 3,00 gld.

Lernu paroli Esperante. D. M. Cibulevskij. Ukraina Respublika Filio de Asocio de Sovetaj Esperantistoj, 1988. 70p. 20cm. Ilus. Progresiga legolibro, nur en Esperanto. 4,50 gld.

Mistero. Petro Anselmo. Paderborn: Esperanto-Centro Paderborn, 1988. 32p. ISBN 3-922570-53-4. 21cm. Rakonto pri aventuro de geknabaro en la ruino de mezepoka kastelo. 9,90 gld.

Nigra magio. Lingve reverkita de Christian Declerck laŭ la originalo de Deck Dorval (pseŭd.). Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1988. 216p. 21cm. Serio "Stafeto" n-ro 7. Kronologie la unua aventuro de policisto Ksaverio Kant, en kiu li ŝajne devas lukti kontraŭ sorĉistino. 24,30 gld.

Nova gramatiko de Esperanto. Beijing: Pekina Esperanto-Asocio, 1987. 324p. ISBN 7-5629-0053-1. 20cm. Por ĉinlingvanoj. 12,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18,5% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Foliume

• **Budhismo . . .** : Malgraŭ la forpaso de Budhana Ligo Esperantista, tiu fako de la Esperanto-movado – pro la furora disvastiĝo en Orienta Azio – fariĝas pli aktuala ol iam antaŭe. Antaŭnelonge aperis la unua korea religia skribaĵo en Esperanto: Chôngjôn, la Baza Skribo de Wonbulgyo, budhisma religio fondita de Pak Chung-Bin. Ĉi tiun tre belan dulingvan eldonon (14,10 gld. de la Libroservo de UEA) faris Ŭonbulgjo-Esperantista Societo (WES), fondita en 1980, kaj la ĉeftradukinto Ch'oe Tae-sòk meritas gratulon pro la lingve senriproĉa redono de nuancrica teksto. Laŭ la postparolo, WES ankaŭ aperigas revuon, *La cirklo*. Por informoj skribu al WES, 58-9, Nakwon-dong, Chongno-gu, 110320 Seulo, Korea Respubliko.

. . . **kaj aliaj religioj:** Budhistoj ne monopolas altkvalitajn religiajn librojn en Esperanto: inter lastatempaj verkoj, ni povus elstarigi jenajn: *Sanktuloj de la romia kalendaro*, tradukita el la nederlanda de L. H. Brans (25,50 gld. de la Libroservo), donas historiajn kaj biografiajn informojn en simpla kaj klara stilo. *Esplorado de vivĝojo* de Hidemaru Deguĉi, eljapanigita de Eizo Ito (32,70 gld. de la Libroservo), enhavas meditaĵojn kaj konsilojn kiuj reflektas la filozofion de Oomoto en persona spegulo. Kompara

religio el la vidpunkto de spiritisto konsistigas la enhavon de *Spiritismo kaj homfaritaj religioj* de Nassif Isaac (originale verkita; 3,00 gld.). Kaj pro la filozofia enhavo, kvankam nepre ne temas pri religio, menciindas *Ŝanco por feliĉo* de Phil Bosmans, la belga fondinto de Movado sen Nomo: poeziecan pledon por "kulturo de la koro" vi trovos en la bele eldonita traduko de Lydia Kerremans (12,00 gld.).

• **Naturkuracado:** El Koreio venas plia nova fakrevuo, *ENA informilo*, pri la aferoj de Esperantista Naturkuracista Asocio. Tiu ĉi juna organizaĵo jam havas 40 membrojn en 25 landoj kaj serĉas kunigi ĉiujn, kiuj havas profesion aŭ simplan intereson pri naturmetoda kuracado, ekz. homeopatio, orienta medicino, akupunkturo, akupresuro, masaĝo, radiestezio, dietistiko, jogo ktp. La dua numero de la informilo raportas pri pluraj el tiuj temoj. Jarabonojn-membrigojn (nur \$US2), demandojn, artikolojn akceptas la ĝenerala sekretario Puramo CHONG, Pk. 3047, Seulo 100, Korea Respubliko.

• **Language International** (recenzita de Dan Maxwell): Malgraŭ la laŭvorta traduko de la titolo, tiu ĉi nova anglalingva revuo ne okupiĝas pri Esperanto aŭ la

ideo de tia komuna mondlingvo, sed celas informi tiujn, kiuj profesie okupiĝas pri lingvo, pri novaj evoluoj, kiuj iel rilatas al tiu sama temo. Ĝi aperas ĉiun duan monaton ekde januaro ĉi-jare. Ni fieru, ke Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA, estas membro de la internacia redakta komisiono.

La redaktantoj promesas, ke en la revuo temos pri la intereso kaj bezonoj de la legantoj. Jen la plenumo de tiu promeso en la unua numero: oni trovas artikolojn pri lingvaj foiroj, la angla de komerco, la kambaĝa lingvo, perkomputila instruado de la japana, komputilaj tekstprilaboriloj por bharataj lingvoj, interpretado, tradukado, kaj vortariko. Krome estas recenzoj pri kelkdeko da libroj kaj kalendaro de konferencoj okazontaj dum 1989 en la tuta mondo. En tiu lasta mankas mencio de la UK en Brajtono, eble ĉar esperantistoj plej ofte okupiĝas pri lingvo ne profesie sed hobie.

Per tia vasta temaro oni celas atingi same vastan publikon, kaj tia celo necesigas ke oni traktu la temojn laŭ ĝenerala maniero, taŭga por nespecialistoj. Tiuj esperantistoj, kiuj kapablas legi la anglan kaj pretas pagi la prezon (90 gld., al John Benjamins, Poŝtkesto 52519, NL-1007 HA Amsterdam), povas per abono de tiu revuo pli bone informiĝi pri aliaj flankoj de sia hobia.

• **Britio:** La fifama brita malemo lerni fremdajn lingvojn kondukas al konflikto inter la brita registaro kaj la Eŭropa Komisiono, kiu ellaboras proponojn por la politiko de Eŭropa Komunumo sur plej diversaj kampoj. Lastatempa rekomendo ĝia antaŭvidis, ke ĉiu lernejo en Eŭropo studu tri fremdajn lingvojn, el kiuj almenaŭ du estu eŭropaj (supozeble de EK). La brita registaro unuflanke kontraŭas tiun eŭropismon, kaj aliflanke dubas pri la praktikeco/dezirindeco de tiom intensa lingvolernado.

• **Estonio/Finnlando:** En februaro la prezidantoj de la E-organizaĵoj de ĉi tiuj du landoj subskribis kontrakton pri amikeco kaj kunlaboro. La estona asocio pasintjare sendependiĝis de Asocio de Sovetaj Esperantistoj, kaj de la komenco de 1989 denove aperigas "Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio", belan kvarpaĝan, dukoloran bultenon. Finnlando kaj Estonio estas historie ligitaj per similaj lingvoj kaj kulturoj; ĉi-jare Estonio transiris al la sama horzono kiel Finnlando, disigante sin de la najbaraj respublikoj.

• **Usono:** Grupo de esperantistoj en la ŝtato Miŝigano starigis fonduson por la donacado de lernolibroj kaj vortaroj al lokaj bibliotekoj, sub la nomo "Semoj". Detalojn disponigas Michael Larkin, 3904 Beadle Lake Drive, Battle Creek, Michigan 49017, Usono.

La usona asocio ELNA lanĉis novaĵbultenon en la angla, kiu raportas pri lingvoproblemoj kaj pri la usona kaj internacia movadoj. La unua numero antaŭvidas rekordan membro-nombron por 1989, precipe pro kreskado ĉe la junularo.

• **Zairio:** Esperanto-Instituto de Zairio, unu el la plej malnovaj E-organizaĵoj en tuta Afriko, festis sian 25-jariĝon la 31-an de majo 1989. Gratulojn, materialojn por ekspozicio ktp sendu al EIZ, BP 13, Lukala (Bas-Zaire).

La prezidanto de Boma Esperanto-Rondo, Mafuila-Tunga Mavomo, BP 34, Boma-II (Bas-Zaire), skribis: "En Boma estas profesiula muzikgrupo en kiu mi muzikas. Nun tiu grupo muzikas multe en Esperanto. . . . Tiuj, kiuj volas distribui nian muzikon, povas mendi sonbendon sendante 10 irk-ojn al mi." Pri la fidiindeco de la informo ni estas certaj; pri la kvalito de la muziko devos juĝi la aĉetantoj!



• **Turkio:** La 5-an de februaro, Turka Esperantista Asocio organizis en Istanbul sian 5-an kongreson. La foto montras novajn estraranojn kaj membrojn. Lernolibroj, materialoj kaj apogo estas bezonataj por venonta kurso; skribu al TEA, Pk. 54, Üsküdar/Istanbul, Turkio.

Fako

• **Ekonomiko/Komerco:** Informa Centro de Sichuan-Provinca Akademio de Sociaj Sciencoj aperigas informilon pri ĉina kaj fremdlanda ekonomio trifoje monate. La revuo estas nun ĉefe en la ĉina, kun anglaj traduketoj, sed la centro volonte rilatos kun eksterlando pere de Esperanto, la angla, franca, rusa, germana aŭ japana. Skribu al Koralo, Redakcio de IĈFE, Xi'an Zhonglu n-ro 62, Chengdu 610072, Ĉinio.

• **Homaj rajtoj:** SAT-Junulfako lanĉas novan agadon en la kadro de Amnestio Internacia, sub la nomo "HELPA". Per Esperanto oni organizos letersendadon al registaroj, kiuj subpremas la homajn rajtojn, dissendos AI-petskribojn ktp. Por detaloj sendu 10 FF/3,50 gld. (se eble) al Ursula kaj Marcel Redoulez, 8 rue de Colette, Apt. 274, F-33150 Cenon, Francio.

Atingis nin informo el Britio, ke la Esperanta faldfolio de AI, kiun oni kunsendis kun la oktobra numero de *Esperanto* pasintjare, portis amason da reagoj el landoj, kiujn AI kutime ne atingas. Oni eventuale organizos kurson por la laborantoj en la Londona ĉefsido.

• **Internacia angla:** La Bulteno de la Londona Esperanto-Klubo raportas fascinan enketon, kiun antaŭnelonge entreprenis internacia reklamagentejo por konstati la efektivan nivelon de komprenado en Eŭropo de la angla. Oni demandis tipan selekton de plenkreskuloj en diversaj landoj pri ilia propra takso de sia komprenpovo, kaj tiam testis tion per tri

sonbendaj frazoj. Evidentiĝis grandegaj diferencoj: En Nederlando iom malpli ol 50% kapablis traduki donitan frazon, en Italio nur 6%. Estis tiaj diferencoj eĉ en unu lando, ekz. inter franclingva Belgio (6%) kaj la flandra parto (46%). Montriĝis, krome, ke pli junaj homoj estas pli kapablaj pri la angla: en la ekzemplo de Belgio, respektive 7% kaj 70% de sub-25-jaruloj sukcesis pri la traduko. Malgraŭ tiu pli pozitiva signo, la raporto konkludas ke la komprenado de la angla "rimarkeble malsuperas la plej pesimismajn el niaj atendoj". Interesatoj petu kopion de Peter Oliver, 3 Monks Court, Powers Hall End, Witham, Essex CM8 1LP, Britio.

La limojn de la instruado de la angla akcentis ankaŭ tutpaĝa artikolo en la usona novaĵrevuo *Time*, la 9-an de januaro 1989. Ĉi-kaze temis pri Japanio, kie pli ol 90% de la studentoj studas la anglan dum ses jaroj sed tre malmultaj regas ĝin parole. La artikolo kulpigis la skribcentran instrusistemon pri tiu malsukceso, kaj sugestis ke komercaj bezonoj iom post iom plibonigos la situacion.

• **Komputila lingvo-instruado:** Por mikrokomputiloj Apple Macintosh ekzistas programo, kiu instruas bazan Esperanton pere de bildoj kaj sinteza voĉo. Por uzi la diskon, kiu mem kostas nur 7 usonajn dolarojn, oni bezonas krome la programon Hypercard. Skribu al Educorp Computer Services, 531 Stevens Ave., Suite B, Solana Beach, CA 92075, Usono.

• **Lingvoplanado:** El bulgara ĵurnalo venas la informo, ke "la mongola sciencisto kaj fama tradukisto Cedendambin Bold ellaboris azian universalan lingvon – Jazu . . . por kiu li vaste uzis la lingvojn ĉinan, mongolan, vjetnaman, japanan, korean, sanskritan, hindian, persan kaj araban. La baza motivo por kreo de la nova lingvo estas ke Esperanto estas farita surbaze de la eŭropaj lingvoj kaj per ĝi oni ne povas transdoni la diversecon kaj riĉecon de la aziaj kaj afrikaj lingvoj." Bedaŭrinde mankis adreso por pluaj informoj.

Usona matematika revuo, *The Mathematical Intelligencer*, aperigis pledon en lastatempe numero por . . . internacia lingvo de matematikistoj! La aŭtoro, Robert S. Strichartz (Universitato Cornell), ŝajne nenion scias pri Esperanto sed faris elokvantan argumenton por la utileco de internacia lingvo – kiun li antaŭvidis devi ellabori de la komenco, surbaze de la jama lingvaĵo de matematikaj tekstoj. La anoj de la DLT-projekto krisignis nian kopion diversloke, do eblas fidi ke ili jam ekvarbas lin. . . .

• **Prospektoj:** Lastatempe ni ricevis informojn pri novaj turismaj informiloj el Anjou, Francio; Ryedale, Britio; Göttingen, FR Germanio; Jyväskylä, Finnlando. Kiel kutime, la Jarlibro de UEA – aperinta fine de aprilo – informos pri la havebleco de tiaj prospektoj kaj la ekzisto de lokaj grupoj, kondiĉe ke tiuj informoj venis al ni sufiĉe frue por enmeto.

• **Turismo:** Monda Turismo anoncas novan konkurson, kies ĉefpremio estos unusemajna partopreno en E-aranĝoj dum 1990 en Benelukso, Hungario aŭ Pollando. Temas pri kolektado de historiaj materialoj pri Esperanto kaj turismo, ekz. artikoloj, afiŝoj, faldfolioj, citaĵoj el libroj, precipe el la fruaj jaroj de la movado. Sendu vian konkursaĵon al Elizabeta Pallos, Ybl M.u.9.1/2, H-7633 Pécs, Hungario, por alveno antaŭ la 30-a de aŭgusto 1989. La aljuĝo okazos fine de septembro en Bydgoszcz, Pollando.

• **Universitatoj:** La tri E-asocioj en la regiono de Toulouse, suda Francio, kunlaboris por realigi serion de tri prelegoj pri Esperanto en la Universitato de Toulouse le Mirail, inter la 28-a de februaro kaj la 3-a de marto. Kontribuis prof. Michel Duc Goninaz, prof. Pierre Janton (foto) kaj d-ro André Albault. Oni esperas starigi studentan E-kurson.

Al la planoj de la Ĉina Akademio de



Sciencoj por internacia universitato uzonta Esperanton (*Esperanto* 1988/ p. 185) respondis esperantistaj fakuloj el multaj landoj. Interalie, la Universitato de Uppsala (Svedio) jam starigis formalajn kondiĉojn laŭ kiuj ĝiaj profesoroj kaj studentoj povus partopreni en la nova universitato.

• **Vegetarismo:** De la 11-a ĝis la 18-a de aŭgusto okazos en Strasburgo (Francio) la dua kongreso de la Eŭropa Vegetarana Unio, kies oficiala lingvo estas la angla. Tiuj, kiuj povos ĉeesti por montri *amike* kaj *takto*plene la valoron de Esperanto, skribu al: Lilia Fabretto, via P. Cartoni 12, I-00152 Roma, Italio.

Persone

• **Albault:** Meze de majo la prezidanto de la Akademio, d-ro André Albault, festis sian 50-jaran esperantistecon. Iama komitatano kaj estrarano (1962-67) de UEA, redaktoro de *Internacia pedagogia revuo* kaj *Monda kulturo*, prezidanto de Unuiĝo Franca por Esperanto dum sep jaroj, li estas tamen plej konata kiel esperantologo. Enirinte la Akademion en 1962, li estis aktiva en la preparoj de la "Konstatoj pri vortfarado", la Baza Radikaro Oficiala, kaj la Oka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro. Plej laste li aŭtoris la "Norman liston de landnomoj", akceptitan de plimulto de la Akademianoj, kiu aperos en venonta numero de *Esperanto*.

• **Malinowski:** La 2-an de marto, la prezidanto de la pola parlamento Roman Malinowski komencis oficialan viziton al Japanio per akcepto en Tokio de delegacio de Japana Esperanto-Instituto. En la foto, de maldekstre: Krizantemo (administranta direktoro de JEI), Yamasaki Seikō (ĝia nova ĉefdirektoro), pola esperantistino-interpretistino, kaj Yosimi Umeda

(direktoro). Malinowski estas prezidanto de la Fondumo Zamenhof, kiu gvidas la preparlaborojn por la Esperanto-Centro en Bjalistoko; li entuziasme parolis kun la delegacio pri ĝiaj perspektivoj.

Kelkajn semajnojn poste, okazis simila renkontiĝo en Italio kun la prezidanto kaj sekretario de Itala Esperanto-Federacio, Giordano Formizzi kaj Renato Corsetti.

• **Triĉkov:** Naŭdekjara fariĝis en marto Radoslav Kuzmanov Triĉkov, kiu antaŭ 65 jaroj fondis la E-societon "Sukceso" en la bulgara urbo Vraca. Peranto de UEA en Bulgario antaŭ la dua mondmilito, li aperis en la *Enciklopedio de Esperanto* (1933) kaj nun de pli ol 25 jaroj estas la Vraca-delegito.

• **Weindling:** La sektion por fremdlandaj amatoroj en la ĉefa konkurso pri literumado de la franca lingvo (evento tre populara en Francio) gajnis usona esperantisto Frederick Weindling. Lia premio: ferio en Aŭstralio, kie verŝajne ankaŭ utilos al li la angla. . . .

Nekrologo

FERENC BAČA (1909-1988) forpasis fine de septembro 1988. Multjara aktivulo, li estis delegito en Bačka Topola, Jugoslavio (1960-1988), kie li ankaŭ gvidis la lokan klubon.

ADOLF BARTOŠIK (1907-1989), honora membro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj multjara membro de UEA, mortis la 3-an de februaro en Prago. Inter la militoj li instruis Esperanton Ĉeĥmetode en Jugoslavio kaj Nederlando, kie li trovis esperantistan edzinon. Talenta grafikisto (1-a premio 1956 ĉe la 41-a UK), li krome postlasis unikan E-filatan kolekton, kiu gajnis por li 32 distingojn kaj medalojn.

LEONARD IVOR GENTLE, dumviva membro de UEA, mortis la 20-an de decembro 1988 en Londono. Li verkis aŭ tradukis pli ol 140 himnojn en Esperanton, kaj ludis orgenon ĉe la monataj E-diservoj en Londono dum pli ol 26 jaroj.

W. W. GLENNY (1916-1989), fakdelegito pri juro en Beverly Hills, Usono, forpasis tie la 16-an de marto. Esperanto-Ligo por Norda Ameriko intertempe starigis librofonduson en lia honoro.

GEORGI CVETKOV IVANOV (1936-1989) forpasis la 11-an de februaro en Kirjaevo, Bulgario. Longjara prezidanto de E-societo "Albatroso" en Varna kaj direktoro de la tiea Internacia Esperanto-Kursejo, li energie kontribuis al organizo de la 63-a Universala Kongreso en 1978 en la sama urbo. Bulgara Esperantista Asocio honoris lin per siaj plej altaj distingoj. Ĝis sia morto li restis aktiva partoprenanto en la landa kaj internacia movadoj.

ARTHUR NOBES (1905-1988), esperantisto de pli ol 50 jaroj, mortis la 17-an de decembro 1988 en Norwich, Anglio. Aktiva en la laborista E-movado dum la tridekaj jaroj, li aperigis en 1983 mallongan historion pri Brita Laborista Esperanto-Asocio kaj la Internacio de Proleta Esperantistaro. Inter 1963 kaj 1967 li redaktis *The British Esperantist*. Antaŭ sia morto li komencis biografion de la brita pioniro Montagu C. Butler.

ANTONIO RODRIGUEZ DA SILVA, dumviva membro de UEA, forpasis la 11-an de januaro en Rio de Janeiro, Brazilo.

RAKOTONDRAVAO (1917-1989), vicdelegito en Antananarivo pri la fakoj turismo, instruado kaj financoj, mortis la 24-an de februaro 1989 en la madagaskara ĉefurbo pro malario. Dum multaj jaroj li estis unu el la plej aktivaj kunlaborantoj de UEA en la tuta afrika kontinento. Instruado estis lia granda merito en lando, kie malabundas kompetentaj instruantoj: li ĉiam helpis al lernantoj kaj mem verkis vortareton Esperanto-malagasan. Multaj memoros lian malaltan figuron ĉe la kongresoj. Ankoraŭ en Roterdamo, 1988, li ceestis por prezenti al UEA la organizajn problemojn de la madagaskara movado, kiu perdis en li kaj apogon de roka stabileco, kaj lingvokapablulon.

MEMORE AL JIŘÍ KOŘÍNEK

*Iam en amika horo vi diris al mi:
– Ĉion mi ŝanĝas en poezion.
Feliĉo por mi estas trankvile dormi,
ĝi estas edzinrideto, metaforoj,
kion diras filo al filin',
komuna manĝado ĝi estas vespere.
Domaĝe, ke la vivo-universon
oni povas
vortigi nur tiom surface kaj ere.*

*Ne, poezio neniam estis por vi
nur ia surogato de plensanga viv'.
Destino via ĝi estis.*

Feliĉo

kaj fato.

Jiří Karen



MIGUEL SANCHO-IZQUIERDO (1890-1988), membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, forpasis la 2-an de decembro 1988 en Zaragoza, Hispanio. Profesoro pri la filozofio de la juro, li oficis kiel rektoro de la Universitato de Zaragoza de 1941 ĝis 1954 kaj poste kiel ĝia honora rektoro. Pluraj aliaj universitatoj, kune kun la hispana ŝtato, distingis lin per honoraj titoloj kaj diplomoj. Esperanton li eklernis en 1908, partoprenante la postan jaron en la 5-a Universala Kongreso en Barcelono. Sian plej aktivan periodon en la movado li eniris en 1963, kiam oni elektis lin prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio; sub lia egido la landa movado, iam subpremita sub la reĝimo de Franco, sukcesis reorganizi sin ĝis la okazigo de Universala Kongreso en 1968, kun la generalo kiel Alta Protektanto. De post 1969 Miguel Sancho-Izquierdo estis la Honora Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio.

Oficiala Informilo

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBRO

Britio: L. J. Lane. Japanio: F-ino Misako Harada. Nederlando: Dan N. Maxwell.

DONACOJ 1989 (gld.) ĝis la 30-a de aprilo

FONDAĴO AFRIKO: Belgio: L. Drèze 100,00. Finnlando: H. Tietti 82,50. Japanio: Maedi Yonemi 48,14. Kanado: C. Lebuis 17,30. Nederlando: D. N. Maxwell 1000,00; W. A. Bakker-Smith 100,00; M. H. v. Zadelhoff 100,00. Svedio: E. Swärd 66,00; J. Hammarberg 25,00. Anonimaj donacoj: 10 000,00; 563,25. Zamenhof-tagaj donacoj 115,00. Sumo ĉi-jara: 15 010,72.

FONDAĴO CANUTO: Kanado: Alma More 17,30; C. Lebuis 17,30; M.-R. Penny 17,30; R. Lebeau 17,30; D. Dufort 17,30. Nederlando: F. Zeiler 77,00. Svedio: E. Brenander 82,42. Diversaj malgrandaj 17,50. Sumo ĉi-jara: 3630,21.

FONDAĴO ANTONI GRABOWSKI (en usonaj dolaroj): Francio: T. Nowak 50,00. Sumo ĉi-jara: 550,00.

ĜENERALA KASO: Finnlando: Eila Dahlman 14,50. Kanado: Betty Salt 2117,68. Anonimaj donacoj: 962,40; 563,25. Diversaj malgrandaj 5,21. Sumo ĉi-jara: 10 152,96.

FONDAĴO OFICEJA ILARO: Kanado: Betty Salt 5000,00. Sumo ĉi-jara: 5000,00.

FONDAĴO TEJO: BRITIO: F. HOWARD 17,98. SUMO ĈI-JARA: 17,98.

FONDAĴO WÜSTER: Anonima donaco el FRG: 2246,01. Sumo ĉi-jara: 7246,01.

ĈINIO: Zamenhof-tagaj donacoj 725,00. Sumo ĉi-jara: 995,00.

TRIA MONDO: Britio: J. M. Bunting 21,72. Sumo ĉi-jara: 6280,45.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

Jen nia libromondo.

Jubileo tute ne estas ia seka protokolo; male, la tuta libro estas plenŝtopita je valoraj kaj stimulaĵoj kontribuoj, kiuj analizas la pasintecon kaj aŭguras sagace la estontecon.... Troviĝas tre multaj ilustraĵoj, kaj la reprodukto estas unuaranga, liverante konservindan arĥivon pri la nuna stato de la movado.

WILLIAM AULD, SKOTLANDO
57,00 gld. (en *Esperanto*)

Ĉiutaga filozofio, jen la ĉefa temo de **Laŭdo de l' Stulteco**, verko de Erasmo de Roterdamo publikigita en 1511... Post kritiko de la socio ĝenerale, la katolika Erasmo severe riproĉas la tiutempajn teologion kaj ekleziulojn...

30,00 gld. REVUO SIMPOZIO, BRAZILIO

W. Auld estas poeto, tradukisto, eseisto, kritikisto, instruisto. Mi kuraĝas diri, ke ĉiujn siajn atutojn li kunigis en **La fenomeno Esperanto**.... Ĉiu unuopa aspekto de Esperanto estas traktata eĉ se tra malmultaj paĝoj, tamen kun mirinda ekvilibro inter kompleto kaj sintezo.

CARLO MINNAJA, ITALIO
18,00 gld. (en *Heroldo*)

Se vi opinias ke la interlingviko estas preciza scienca fako... nepre aĉetu **Plurlinguisme et communication**.

JONATHAN POOL, USONO
57,00 gld. (en *Esperanto*)

Unuflanke Socilingvistikaj aspektoj de la internacia lingvo ege instigas la pensadon, kaj aliflanke ĝi ilustras la kutimajn konversaciojn kun skeptikaj eksteruloj je alta kaj malnaiva nivelo.... Mi forte rekomendas la legon de ĉi tiu libro.

PROBAL DAŠGUPTO, BHARATO
27,00 gld. (en *Esperanto*)

Malgraŭ paĝnombro negranda, **Vetero kaj klimato de la mondo** havas zorge plenitan skemon de temoj. Multe da konkretaj ekzemploj de veteraj situacioj en diversaj partoj de la mondo faciligas la klimatologiajn konkludojn.... Ĝojigas zorgema eldona aspekto (pli ol 150 mapoj ktp) kaj la kompetenta traduko.

ELŻBIETA NAWROCKA, POLLANDO
28,50 gld. (en *Esperanto*)

Por bone kompreni la situacion de Esperanto entute, ĉiu konscia adepto de la lingvo nepre devas legi **La danĝera lingvo**.

STEFAN MAUL, FR GERMANIO
66,00 gld. (en *Monato*)

La aŭtoro de **Amo kaj morto en Balio** liveras rakonton pri la amo, la ĝojo, kaj ankaŭ la kruela suferado en Balio frue en la nuna jarcento.... La Esperanta teksto bele fluas... kaj donos plezuron al legantoj de la tuta mondo.

DON LORD, ANGLIO
28,50 gld. (en *Heroldo*)

Jen la kvintesenco de nia lingvo, verkita en modela Esperanto.... Leganto kiu interesiĝas pri interlingvistiko kaj esperantologio trovos **Esperanto: lingvo - literaturo - movado** tre utila enkonduko en tiujn sciencojn.

JOZEF MAJOR, NOVZELANDO
18,00 gld. (en *Novzelanda esperantisto*)

Ĉi tiu riĉ-enhava kaj lingve bonega libro estas skribita en stilo, kiun oni sen pli povas nomi modela. Kvan-kam la aŭtorino klopodas por ke **Faktoj kaj fantazioj** estu gradigita de tre facila al malpli simpla, ni nenie trovas stilon infanan, nematuran kaj tedan, kiel ofte en lerniloj. Ĉi tie ni renkontas Esperanton en ĝia pura formo, klara, senartifika kaj ofte tre originala.

H.A. DE HOOG, NEDERLANDO
36,00 gld. (en *Dia regno*)

Inter la antaŭ nelonge ekhaveblaj publikigaĵoj kiuj science traktas Esperanton, elstaras kvalite la pluraŭtorita studaro **Studoj pri la internacia lingvo**.... Pluraj artikoloj estas ĝenerale kompreneblaj kaj legindaj de serioza esperantisto. Por esperantologia aŭ interlingvistika fakulo la tuta verko estas nemalhavebla.

EDMUND BRENT, KANADO
39,00 gld. (en *Esperanto*)

Niaj sociaj strukturoj devos evolui por akompani [la informan] revolucion.... **Infoduktoj** estas aktuala kaj pensiga libro en la ĝenro "populara scienco", kiu vere indus tradukon en Esperanto kaj respondas al vera bezono.

CHRISTIAN BERTIN, FRANCIO
30,00 gld. (en *Esperanto*)

Mendu de la Libroservo de UEA. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

HIRTHARA PETRO



La mondkonata infanolibro en nova, tre fidela traduko.
 "Mirinda libro, kiu meritas nurajn laŭdojn, laŭ ĉiuj aspektoj . . . Flua lingvo, mirinde bela grafika aranĝo, interesaj aldonoj pri la aŭtoro kaj estiĝo de la libro . . ."
 (Monato 4/89)

48p., koloraj bildoj, bindita. Prezo: 12,80 GM. Mendu, aldonante entute 2 GM por sendokostoj, per ĝiro al la eldoninto: Germana Esperanto-Asocio, D-4418 Nordwalde, poŝta konto 2565-854 Nürnberg. Havebla ankaŭ de la Libroservo de UEA (15,60 gld. + sendokostoj).

ESPERANTAJ KAJEROJ

"Jen Vilĉjo Auld, talent' masiva: la emociojn li kontrolas.
 Sed, filozofo pozitiva, li ankaŭ helpas kaj konsolas,
 Vortludas, spritas kaj petolas . . ."
 el *Rimletero*

RIMLETEROJ

originala poemaro de William Auld kaj Marjorie Boulton
 Tra 84 rondeloj daŭras la kurioza korespondado inter W. Auld kaj M. Boulton dum proksimume ok monatoj en la jaroj 1953 kaj 1954. La tono . . . estas tre varia: kelkaj gaje flirtas, aliaj ombre filozofiumas, sed senescepte el ĉiuj radias la rava sincero kaj senpereco de la junaĝo. . . . Jen agrabla poezia legaĵo por ĉiuj parolantoj de nia lingvo.
 Vilmos Benczik en *Esperanto*

DON JOHANO (Unua kanto)

de Lordo Bajton, en traduko de William Auld

Don Johano ja estas eposo – sed ironia, burleska kaj satira. Feliĉe, la satiro pikas pli ol ĝi mordas, rezultigante tonon malpezan kaj bonhumoran, eble la ĉefan ĉarmon de la verko. . . . Ĉe Byron la humuro kuŝas parte en liaj klopodoj trovi frapajn kaj neatenditajn rimojn. Kaj ĝuste pro tiu sama kapablo William Auld ja famas. . . .

James Cool en *Esperanto*

LA GRAVECO DE LA FIDELIĜO

de Oscar Wilde, en traduko de William Auld

Spritante, Wilde ofte inversigis la kutimajn moralaĵojn de la epoko, kaj ne gravis al li la rango de tiu, kiun li pikas. . . . Spritaĵoj kaj paradoksoj abundas, la prozaĵo havas subtilajn ritmojn, kaj ĉiu esprimo kaj parolturno devas salti leĝere al la buŝo de la aktoro. . . . La tutan trezoron de Esperanto Auld rastas por elturniĝi.

Don Lord en *La brita esperantisto*

Mendu de la Libroservo de UEA: *Rimletero* 6,90 gld., *Don Johano* 10,80 gld., *La graveco de la fideleco* 13,80 gld. Libroservoj turnu sin por kvantaj mendoj al Esperantaj Kajeroj, C. P. Tielestraat 23b, 3023 TB Rotterdam, Nederlando.

TOMBOŬTONO POR IVO LAPENNA

UEA starigis apartan konton, kiu kolektos donacojn kontribue al la starigo de memorŝtono ĉe la tombejo en Kopenhago. Se vi deziras tiel honori la memoron de tiu granda organizanto, aŭtoro kaj teoriisto de la internacia lingvo, sendu vian donacon al la UEA-konto tomb-i, ĉe la Centra Oficejo, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.

INTERNACIA SPIRITISMA KONGRESO

- De la 1^a ĝis la 5^a de Oktobro 1989, en la ĉefurbo Brazilio/BRAZILIO, sub la aŭspicioj de la BRAZILA SPIRITISMA FEDERACIO.
- Sub la inspiro de la ĉeftemo "SPIRITISMO – NOVA ERAO POR LA HOMARO" oni pritraktos la amplekson, disvastigon kaj praktikadon de la Spiritisma Doktrino.
 - Simultana tradukado en ESPERANTON, krom en la anglan, la francan kaj la hispanan.
 - ESPERANTO kaj ESPERANTISMO konsistigos programerojn de la kongreso, cele al konsciigo de eksterlanda spiritistaro pri la valoro de la neŭtrala internacia lingvo.
 - Aliĝkostoj: 90 usonaj dolaroj.
 - Por pliaj informoj skribu al:
 BRAZILA SPIRITISMA FEDERACIO
 Av. L2 Norte – Quadra 603 – Conjunto F
 70830 – Brasília (DF) – BRASIL



SENNACIULO

Ĉu vi konas ĝin?
 Monata organo de SAT

– Laborista esperantismo – Kontraŭ rasismo
 – Kontraŭ faŝismo – Por la homaj rajtoj –
 Eŝo de sociaj luktoj – Donas la parolon al
 ĉiuj laboristaj tendencoj...

Proveksemplero kun abontarifo havebla kontraŭ internacia respondkuponon ĉe:
 SAT, 67 Av. Gambetta, F-75020 Paris



Ame kaj klare verkita klasikaĵo:

Vivo de Zamenhof (1920) de Edmond Privat
 134 p. 18 cm. Bind. 18,90 gld; triona rabato ekde tri ekz.

Sen pag' lerneblas Esperanto...
 sed malperfekte, se sen PAG!

Plena analiza gramatiko de Esperanto

red. K. Kalocsay kaj G. Waringhien

600 p. 24 cm. Bind. 48,00 gld.; triona rabato ekde 3 ekz.